

1979 decembro

72-a jaro

n-ro 888 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Lego — por la Tago de la Libro

Vi trovos

888 — okcent okdek ok — kiel personan nomon de ĉi tiu numero. Rerigardu la kovrilan paĝon, supre, maldekstre. Aŭ, ĉu vi eble neniam legas tiun titolan tekston? Nu, ekzistas ĉi-foje ankaŭ aliaj kialoj por atente legi ĉiun literon sur la kovrila paĝo, inkluzive de tiu interkrampa fakto aŭ ornamaĵo — "en konsultaj rilatoj kun Unesko" (vidu pri tio la paĝojn 201 — 204). La "Letero el Irano" (p. 202) portas revolucionarajn novaĵojn pri trideko da paĝoj pri Esperanto en du lernolibroj por miliono kaj duono da iranaj gelernantoj. Enestas tiun leteron ankaŭ naiva — aŭ hontiga — demando: "... ĉu ankaŭ en aliaj landoj ekzistas lernolibroj, kiuj enhavas ĉapitrojn pri Esperanto." Krome, Auld nun sidas sur sia akademia ŝtona trono tie supre en Skotlando kaj sendas al ni siajn entuziasmigajn pensojn (p. 206); Golden — tiu nekredebla artikolanto, kies tekstoj ĝis nun ne aperis nur en "Bonbela" (nova periodaĵo el Hinda Unio) kaj "Sekso kaj egaleco", pri kiuj li verŝajne ne sciis, en ĉi tiu numero ne nur E-ekzamenas sed ankaŭ esploras la "real"econ de la lernejo de Zamenhof. Aliaj aŭtoroj traktas aliajn temojn aŭ temetojn. Sed tiu 888? Tiel komplike ronda, la numero estus pli prijubileinda, ol tiu triviala afero kun unu antaŭ tri nuloj, kiun ni devige prifestos en la jaro 1990 (en februaro, se ni bone kalkulis). Pli proksima ol tio estas 1980, kiu belu por vi, de ni. Sanon!

Enhavo

- 201 Kvarona jarcento de la Unesko-rezolucio pri Esperanto: 25 jarojn post la venko de Montevideo (Ulrich Lins)
- 202 Letero el Irano: Informiĝo de miliono kaj duono da gelernantoj (Ĵila A. Saheb-Zamani)
- 205 Kunsido de la Estraro de UEA: UEA en Nov-Jorko kaj Budapeŝto?
- 206 Decembra medito el Skotlando: La forto de la historio (William Auld)
- 207 Okaze de la 120a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof: Real-lernejo de Zamenhof (Bernard Golden)
- 209 Post la apero de "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto": Pri la Esperanta metalingvo (István Szerdahelyi)
- 210 Recenzoj: "Leo Tolstoj; La homo, la verkisto kaj la reformisto" (Vladimir V. Samodaj); "Esperanto and international language problems; A research bibliography" (Peter G. Forster); "Infanoj en la mondo" (Wouter F. Pilger); "Marvirina luno" (Clelia Conterno)
- 212 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 213 TEJO-paĝo: Se vi estas june juna . . . (Stefan MacGill); La 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO
- 214 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 216 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio; Ekzameno E (Bernard Golden)
- 217 Nekrologoj (V. Dall'Acqua, J. van Dooren, J.L. Ford, C.M. van Kleef, H. Nägeli, H. Noponen, F. Rasoanaivo, I. Rautio); Anoncetoj
- 218 Indekso de la Jarkolekto 72 de la revuo "Esperanto"

La kovrilo

Jen decembro kaj — do — libro sur la kovrilo. Bela foto. Surpriza, ĉar kaŝe farita, tiel ke la legantino ne surpriziĝis. Ŝi simple plulegas, revas eble, imagas la tutan mondon esti tiel trankvile idilia kaj verda, kiel ŝia ĝardeno, herbeja peco, kio ĝi estas. Ŝi legas, ne pozas: libero de la ŝua premo, libero por la venteto en ŝia hararo, ĉio for — la libro en la centron de la atento, en la mezon de la fotografista fokuso. Kompreneble, la foton ni ŝuldas al la bulgaro Zdravko Nikolov, kiu per siaj artaĵoj gastis jam plurfoje sur niaj paĝoj. Sed, kiam ni en la Movado, en ĉi tiu libra Movado, parolas pri la libroj, ni ne plu devus insisti pri la kvantoj. Ne necesas. Aperis jam dekmiloj, kaj la eldona viglo ne montras stagnosignojn. Pri lego ni nun devus insisti. Ĝi estas tiu speco de la necesa armado per kiu ni volas kaj povus konkeri la mondon. Havu do legajn, ne nepre aĉetajn pensojn por la ĉi-jara Tago de la Libro — la 15a de decembro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1 p. 500 gld. 1/2 p. 265, 1/4 p. 145, 1/8 p. 85, 1/16 p. 55 gld. Ne-Esperantaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Eksterakviritaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo, eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) 259 8821.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

25 jarojn post la venko de Montevideo

La 10an de decembro ĉi-jare kompletigas 25 jaroj de post la akcepto de la jam fama rezolucio pri Esperanto en la 8a Ĝenerala Konferenco de Unesko en la urugvaja ĉefurbo en 1954. Por tiu okazo ni petis d-ron Ulrich Lins, historiiston kiu okupiĝas pri la pasinteco ankaŭ de la Esperanto-movado, rerigardi al la okazintaĵoj en 1954 kaj el la hodiaŭa perspektivo reekzameni la signifon de tiu rezolucio, kiu laŭ sia famo ne havas parulon en la postmilita historio de la Movado. Kvazaŭ ilustre al la teksto de Lins, ĉi tiun revunumeron akompanas 24-paĝa broŝuro "Unesko – kio ĝi estas, kion ĝi faras, kiel ĝi funkcias". Tiu plia eldonaĵo de Unesko en la Internacia Lingvo atestas, ke la rilatoj inter UEA kaj Unesko ĉiam pli kaj pli intensiĝas, ke la montevidea semo estis fruktodona kaj signis novan epokon de la Esperanto-movado.

UNESKO estis kontaktita de la Esperanto-movado jam duonan jaron post sia fondiĝo. En majo 1946 la brito E.D. Durrant, aŭtoro de tre bona angalingva verko pri Esperanto (*The language problem*, 1943), starigis kontakton kun la nova organizaĵo ĉe ĝia provizora sidejo en Londono. Fine de septembro 1946 Unesko translokiĝis al Parizo, kaj en la sekva monato Durrant, kiu dum ĉ. sep jaroj estis la komisiito – unue de Internacia Esperanto-Ligo (IEL), poste de la nova UEA – pri rilatoj kun Unesko, veturis tien por priparoli grandan kampanjon tiutempe organizatan de IEL. Nome, komence de 1946 estis lanĉita la varbado de subskriboj por Peticio, direktota al Unuiĝintaj Nacioj. Tiu Peticio celis atingi, ke UN agnosku la popolinterligajn servojn de Esperanto kaj helpu la pluan vastigon de ĝia uzo.

Komprenante la rolon, kiun povus ludi Unesko por la sukcesigo de la Peticio, Durrant dum sia unua vizito al Parizo interkonsentis pri komuna deklaro, laŭ kiu IEL regule informos Uneskon pri la evoluo de la Peticio kaj Unesko sekvos "neŭtralan sintenon" rilate la klopodojn celantajn al enkonduko de internacia helplingvo.

La subskribokampanjo daŭris ĝis la fino de 1948. Ĝia rezulto estis impona: **subskribis la Peticion 492 organi-**

zaĵoj kun entute 15 454 780 membroj kaj 895 432 individuoj – entute homoj el 76 landoj. Komence de aŭgusto 1950 la propono estis – en formo de kvar grandaj albumoj – transdonita al Unuiĝintaj Nacioj, kiuj siavice tuj pludonis ĝin al Unesko, sia specialigita organizaĵo, por pritrakto.

Dum la postaj jaroj UEA konstante timis, ke la Peticio kovriĝos per arkiva polvo kaj ne sekvigos iujn paŝojn.

Rezolucio

de la 8a Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo, 1954


IV.1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;

IV.1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV.1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV.1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV.1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurentan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.



Grava, malofte priparolita rolo en la kontaktoj inter UEA kaj Unesko: E.D. Durrant antaŭ 30 jaroj kaj lastatempe

Kvankam la ĝenerala direktoro de Unesko, Jean Thomas, persone salutis, ankaŭ komence de aŭgusto 1950, en la Inaŭguro de la 35a Universala Kongreso en Parizo kaj kvankam en la sama jaro amiko de Esperanto, la brito Herbert Lionel Elvin (nuntempe membro de la Honora Patrona Komitato de UEA), iĝis direktoro de la Eduka Fakto de Unesko, necesis insistaj memorigoj flanke de UEA por malhelpi subtabligon de la Peticio. Speciale aktiva en la postkulisaj traktadoj estis Durrant, dum la necesan apogon per faktoj pri la disvastiĝo de Esperanto provizis Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), fondita de prof. Ivo Lapenna la 1-an de januaro 1952.

En aŭgusto 1952 la Plenum-Komitato de Unesko ja preparis dokumenton kiel sekvon de la Peticio, sed formulis ĝin pli kiel demandon, ĉu entute Unesko okupiĝu pri problemoj rezultantaj el la diverseco de lingvoj. La Peticio mem estis menciita en la dokumento nur per kelkaj linioj. Tamen, kiam en novembro 1952 komenciĝis en Parizo la Sepa Ĝenerala Konferenco de Unesko, du reprezentantoj de UEA, Durrant kaj Lapenna, estis allasitaj kiel observantoj. La starpunkto de la Esperanto-movado nun povis esti rekte prezentita. Fine, la 11an de decembro 1952 la Ĝenerala Konferenco adoptis rezolucion, kiu rajtigis la ĝeneralan direktoron de Unesko komuniki la Peticion al la ŝtatoj-membroj kaj "entrepreni, konforme al komentoj ricevotaj, la necesan preparlaboron por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi, dum la Oka Sesio, pri la agoj entreprenotaj je tiu ĉi Peticio".

De tiam la afero bone marŝis. Surbaze de la ricevitaj respondoj, Unesko publikigis la 1-an de junio 1954 dokumenton kun la titolo *Raporto pri la Internacia Peticio favore al Esperanto*. Ĝi montris, ke krom mul-

taj ŝtatoj, kiuj sintenis indiferece aŭ rekte negative, almenaŭ el naŭ landoj venis kuraĝigaj respondoj. Kiam aperis la dokumento, UEA jam febre preparis sin por la decida okazo — nome la Oka Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo, al kiu ĝi denove estis invitita sendi observanton. CED jam en novembro 1953 estis kompilinta por Unesko detalan raporton pri la stato de Esperanto kaj havigis ankaŭ al la landaj asocioj bazan materialon por kompetenta traktado kun la naciaj aŭtoritatoj. Krome, ĝustatempe komenciĝis preparlaboroj por ekspozicio de la Esperanta literaturo okazonta dum la Konferenco en Montevideo.

* * *

Lapenna, la observanto de UEA, alvenis — ŝipe — en Montevideo la 1-an de novembro 1954 kaj tuj energie ĵetis sin al la surlokaj taskegoj, sciante kun kiom da atendoj la esperantistoj observas la trapason de la Konferenco. Sur la tagordo troviĝis du demandoj en rilato kun Esperanto: la unua koncernis la peton de UEA (faritan fine de junio 1953) pri konsultaj rilatoj kun Unesko; la dua temis pri la Peticio.


La unua demando solviĝis sen komplikadoj: La peto de UEA pri konsultaj rilatoj estis akceptita eĉ unuanime. La dua demando, tamen, renkontis ŝajne nevenkeblajn obstaklojn, precipe pro tio, ke nek la ĝenerala direktoro de Unesko nek iu ŝtato-membro prezentis proponon sekve de la raporto pri la Peticio. La delegitoj el 72 landoj ja estis provizitaj per dokumentoj de CED, la Universala Ekspozicio impone demonstris la atingojn de Esperanto, kaj la urugvajaj amaskomunikiloj kun simpatio raportis pri la celoj de UEA. Sed malgraŭ senĉesaj kontaktoj kun delegitoj Lapenna ne progresis pri la plej grava punkto: la iniciatado de oficiala propono al la Konferenco. La 30an de novembro li

LETERO EL IRANO:

Informiĝo de miliono kaj duono da gelernantoj

Irano estas la ĉeftemo en la mondaj novaĵoj dum la lastaj monatoj. Ne la irana Esperanto-movado pri kiu ni dum monatoj aŭdis preskaŭ nenion. Ni timis, ke la granda movada fluso tie komencas malaperi. Aliflanke, ni ne sukcesis trovi kialojn, pro kiuj la nuna gvidantaro de la lando ne enprenus Esperanton en sian kulture radikalan idearon. Forta kaŭzo por pensi tiele estis la vortoj, kiujn pri Esperanto diris Ajatula Ŝariatmadari, unu el la plej elstaraj figuroj de la novaj moviĝoj en Irano (vidu lian deklaron en nia numero de januaro 1978, p.7). Nun venas

Irana lerno-
libro kun
18-paĝa ĉa-
pitro pri
Esperanto
kaj s-ino
Ĵila Saheb-
Zamani



la apuda letero de s-ino Saheb-Zamani. Ni aperigas la tutan leteron, preskaŭ. Ni lasas ankaŭ la du belajn adjektivigojn de la finaĵoj "is" kaj "os". La letero montras, ke Irano plu ĉampionas en la klopodoj interesi amasojn pri Esperanto.

JAM DE LONGE mi ne skribis al vi — kiel ĉiam, pro la manko de tempo. Dankon pro la regula sendado de la revuo. Ankoraŭ ekzistas iom da malfacilaĵoj pri devizoj.

Sed pri Esperanto en Irano:

Decidaj meritoj por la plej grava rekono al la Internacia Lingvo: Prof. d-ro Ivo Lapenna (foto el la periodo ĉ. 1954)



sendis poŝtkarton al Eŭropo, kiu informis, ke "la situacio estas absolute senespera".

Du tagojn poste la situacio subite ŝanĝiĝis. Post vizito al la Ekspozicio delegitino el Meksikio estis tiel entuziasmita, ke ŝia delegacio tuj decidis submeti la bezonatan projekton de rezolucio. Rapide estis havigita ankaŭ la subteno de la urugvaja edukministro, kiu samtempe estis la prezidanto de la Konferenco. La 4an de decembro la Programkomisiono traktis la projekton. Oni atendis, ke la proponinto el Meksikio ricevus la parolon; ankaŭ Lapenna levis la manon. Tamen, ial la komisiona prezidanto donis unue al la dana delegito, prof. Andreas Blinkenberg, la rajton paroli. Ties

interveno estis mallonga, sed katastrofa. Nomante sin lingvisto, Blinkenberg kvalifikis Esperanton la inventaĵo de amatoro — lingvo kun malriĉa vortaro kaj primitiva sintakso, per kiu maksimume eblas esprimi la urugvajajn menuojn, sed neniel servi al kulturaj celoj. Blinkenberg spicis sian paroladeton per mokaj vortoj, kies enhavo memorigis Lapenna pri "spritaĵoj", kiujn li "jam antaŭ multaj jaroj aŭdis de du klaŭnoj en iu balkana vilaĝa cirko".

Lapenna poste ricevis la parolon kaj celis dum tri minutoj, kiel li pli malfrue raportis, "restarigi la atmosferon de kulturo kaj de digno". Lin apogis la urugvaja delegito. Tiam sekvis la voĉdono: Meksikio, Urugvajo kaj Ĉinio (Tajvano) subtenis la rezoluci-projekton, 23 kontraŭis ĝin, kaj 19 sin detenis. La multjaraj fortostreĉoj de UEA abortis en marĉo de malespero.

Nerve malpli eltenema homo en tiu momento verŝajne estus kolapsinta, sed Lapenna senprokraste rapidis al kunsido kun la gvidantoj de Urugvaja Esperanto-Societo por ellabori la tekston de protesta letero sendota al la urugvaja gazetaro. Tiu letero kondamnis la konduton de Blinkenberg kiel ofendon ankaŭ al la gastiganta lando kaj lerte aludis al la kostoj, kiujn devas pagi la urugvaja popolo por Konferenco tiel neserioze flankenŝovanta la dezirojn de 16,5 milionoj da subskribintoj de Peticio. La gazetoj unu post la alia publikigis la leteron kaj dediĉis al la incidento siajn proprajn komentojn. La Societo krome proteste resendis al la dana konsulejo esperantlingvan kulturan filmon pri Danlando.

La strategio de Lapenna kaj Urugvaja Esperanto-Societo armi sin per la subteno de la publika opinio montriĝis grandskala sukceso. Estas malfacile diri, kial la gazetaro tiel unuanime prenis la pozicion de Esperanto,

1e. Miaj kursoj rekomenciĝis ekde la 23a de septembro, la komencdato de la studjaro, en la Universitato de Tehrano; ĉi-foje en la fakultato pri tekniko. Okazas tri elementaj kursoj kun 150 gekomencantoj kaj unu paroliga kun 50 gepartoprenantoj. Kiel la isan jaron, la kursoj estas nedevigaj, sed oni pagas min laŭ la pagleĝo por profesoroj. Ĉiu kurso estas trihora semajne.

2e. Dek geprofesoroj pri belartoj petis de Saheb [d-ro Saheb-Zamani] Esperanto-kurson, kaj li prezentis al ili s-ro Aref Azari kiel la instruiston. Li komencis la kurson antaŭ tri semajnoj.

3e. D-ro Pezeŝki havos sian Esperanto-kurson en Karaĝ apud Tehrano, kie li loĝas, ekde la osa monato.

4e. Sed la plej grava estas jeno: Antaŭ unu semajno aperis la sociologiaj lernolibroj de la gimnazioj (kompreneble kun iom da malfruigo pro la revolucio kaj la reverkado). En du el ili — tiuj de la unua grado (naŭa klaso) kaj la tria grado (dek-unua klaso) — Saheb verkis ĉapitrojn pri Esperanto: en la unua, 7-paĝan ĉapitron, kaj en la dua, 18-paĝan ĉapitron (tio estas okono de la libro — 144-paĝa), kun bela bildo tutpaĝa

de Zamenhof, kiun faris irana pentristo. La nomoj de la ĉapitroj estas "Kulturo kaj lingvo". Nu, ĉi-jare preskaŭ 1,5 miliono da gelernantoj iranaj konatiĝos kun Esperanto. Dezirinde estas scii, ĉu ankaŭ en aliaj landoj ekzistas lernolibroj, kiuj enhavas ĉapitrojn pri Esperanto.

5e. De la 30a de oktobro, la komencdato de la nova programo de Radio Pekino, preskaŭ 200 geirananoj raportis ĝian aŭskulton. Nur, ekzistas en iuj noktoj apudaj stacioj, kiuj ĝenas la aŭskulton. Ĉu ne eblas, ke oni direktu la elsendojn ankaŭ al mez-oriento? Ĉi tie, la programo aŭdiĝas je la 23.30-24.00 h. laŭ la loka tempo. Tia entuziasmiĝo povas esti instiga, ne nur por Pekino, sed ankaŭ por aliaj landoj!

Ĉi-jare, inter la nedevigaj kursoj en la Universitato de Tehrano, la sola fremda lingvo, por kiu oni anoncis kaj aranĝis kursojn, estas Esperanto. Nuntempe, Esperanto povas esti rigardata kiel forta batalilo kontraŭ la koloniigaj lingvoj, precipe en la liberiĝintaj landoj, kiel la nia. Tio ne ĝenas la neŭtralecon, ĉu?

1979 11 07

Jila A. Saheb-Zamani

sed gravan rolon sendube ludis la elemento de emocioj. Minimume ĉiuj gastronomoj kaj dommastrinoj de Urugvajo iĝis apogantoj de UEA jam pro la malflata rimarko de Blinkenberg pri la urugvajaj menuoj. La efiko ĉiuokaze ne haltis antaŭ la konferencejo mem: La delegitoj ekatentis la ŝaŭmantan publikan opinion kaj konsciiĝis pri la graveco de afero, kiu — laŭ la posta formulo de Lapenna — "minacis fariĝi monda kultura skandalo".

Delegitoj alpaŝis la observanton de UEA por deklari sian malsolidariĝon kun Blinkenberg, multajn el ili Lapenna vidis "atente legi la dokumenton CED/4", ŝvelis la nombro de vizitantoj al la Ekspozicio. Kaj, kion neniu povis atendi, kontraŭ ĉiuj procedaj reguloj la respondeculoj de Unesko konsentis, ke pri la meksikia rezolucio, jam faligita en komisiono, okazu voĉdono en la plena sesio de la Konferenco. Estis la 10a de decembro 1954, la lasta tago de la Konferenco, la salono kaj la galerioj estis plenŝtopitaj. En la lasta vico solece sidis Lapenna; antaŭ li iom malpura tabuleto kun la surskribo "Observanto de Universala Esperanto-Asocio".

maj semajnoj de Montevideo Lapenna ne diras, ĉu je la fino li havis larmojn en la okuloj, sed tio estas tre probabla.

* * *

Se la urugvaja publiko emocie reagis, des pli granda estis la reeĥo en la Esperanto-movado je la sukcesa plenumo de la misio de Lapenna en Montevideo. La Rezolucio de Unesko estis la plej aŭtoritata agnosko de la atingoj de Esperanto post la decido de Ligo de Nacioj en 1922. Ĝi povis esti vaste utiligata de tiam en la nacilingva informado kaj helpis kontraŭagi almenaŭ facilaniman neglekton de Esperanto. Kiel konate, ĝi sekvigis kontentigan pluan evoluon de la rilatoj inter UEA kaj Unesko, kulminantan en 1977 per la ĉeesto de la ĝenerala direktoro M'Bow en la Rejkjavika Kongreso.

Kvankam en 1954/55 neniu povis antaŭvidi tiun evoluon, la esperantistoj plene ĝuis la momenton de triumfo. La cirkonstancoj ĉirkaŭ la akceptigo de la Rezolucio estis tiaj, ke ili, eble unufoje en la historio de Esperanto, donis al la esperantistoj la senton pri vera, senmakula sukceso en monda skalo. Oni scias, kion signifas la vorto "venko" en la menso jam de la pioniroj. Ekde Zamenhof ĝi simbolis la finan rezulton de multa pena, ofte vana, laboro. La Rezolucio de Unesko ankoraŭ ne estis tiu venko, sed ĝi ŝajnis decida paŝo survoje al ĝi.

Nemirige do, ke Lapenna estis supersutita per laŭdoj kaj gratuloj. La Esperanto-gazetoj entuziasme aplaŭdis al lia "laboro herakla" kaj "titana energio". La atingo ĉe Unesko estis senrezerve nomata ankaŭ persona triumfo de Lapenna. Li estis la "heroo de Montevideo". La poetoj partoprenis la celebradon per laŭkazaj odoj: Reto Rossetti versis pri "Lapenna ĉe Unesko", William Auld en poemo riverencis antaŭ la "Jupitero" Lapenna ("Ni, kiuj Esperanton amas, lin amas kore") kaj skribis enkonduke al *La infana raso* longan dediĉon al la "kara doktoro". Karesan formon havis la reago de Marjorie Boulton: ŝi donis al sia kato la nomon "Montevideo".

25 jarojn poste: kion konkludi hodiaŭ, kiam ni iĝis ĝenerale pli sobraj kaj ankaŭ la poetoj ŝanĝis sian stilon? Unue, la venko de Montevideo havis multajn patrojn. Kontribuis al ĝi Durrant, la aktivuloj de UEA kaj de la landaj asocioj, la kunlaborantoj de CED, la membroj de Urugvaja Esperanto-Societo kun ĝia prezidanto, la forpasinta prof. Fernández Menéndez, la multaj mondonacintoj kaj, kompreneble, plej okulfrape Lapenna. Pri ĝi sekve rajtis fieri la tuta Esperanto-movado. Due, la rekona deklaro de Unesko montris sian veran valoron nur per tio, ke poste la Movado ne ripozis sur laŭroj, sed strebis daŭre plilarĝigi kaj firmigi la rilatojn kun Unesko, tiel transformante la inspirajn vortojn de la Rezolucio en novan realecon. En tiu senco ni povas ĉerpi el la rememoro pri la spirhaltige streĉa lukto de 1954 la konscion, ke la peno valoris — ke kombinaĵo de prudento, volforto kaj kuraĝo, kia montrita en Montevideo, estis profitdona.

Ulrich Lins

REUNION DE PRENSA ★ Sobre el Esperanto



Con motivo de hallarse en nuestra ciudad el Dr. Ivo Lapenna, Director del Centro de Investigación y Documentación de la Asociación Universal de Esperanto, se efectuó una reunión de prensa en cuyo desarrollo se vertieron diversos conceptos sobre el futuro que aguarda al idioma internacional y su vinculación con la VIII Conferencia General de Unesco. En el grabado se ve a los asistentes al acto de referencia.

Montevideo, Instancia Decisiva Para el Porvenir Del Esperanto

EL IDIOMA INTERNACIONAL EN LA UNESKO

La VIII Reunión de la Conferencia General de la UNESCO que se viene realizando en Montevideo será de fundamental importancia para determinar el futuro papel que corresponderá jugar al Esperanto, como idioma universal. De adoptarse una resolución favorable sobre su adopción en el organismo internacional podrá ser realizable el ideal de una lengua general; en caso contrario el Esperanto, que tiene vitalidad propia, seguirá avanzando lenta pero seguramente, tal como lo ha venido haciendo a través de sus 67 años de vida. Tal fue, en esencia, el concepto expresado en conferencia de prensa en horas de la noche de ayer por el Dr. Ivo Lapenna, ex profesor de Derecho Internacional Público de la Universidad de Zagreb, Yugoslavia, su patria, y actual Director del Centro de Estudios y Documentación de la Asociación Universal de Esperanto.

PETICION INTERNACIONAL

quin ellas el 25 o/o aprende el idio- 10.000 palabras; actualmente existen
ma en cursos; en el 40 o/o es auto- 7.869 raíces que dan un total de

Urugvaja gazetaro estis grava helpo al Esperanto en 1954.

Kiam alvenis la tagorda punkto pri la Peticio, unue parolis la delegito el Meksikio, kiu proponis la Rezolucio kun forstreko de unu paragrafo, nome la — el taktika vidpunkto konsiderebla kiel tro pretendema — rekomendo, ke la ŝtatoj-membroj kuraĝigu la uzon de Esperanto. Pri la definitiva teksto la voĉdono havis la jenan rezulton: subtenis ĝin 30 delegacioj, kontraŭis 5, kaj sin detenis 17 (inter tiuj, kio estis notinda en pozitiva senco, la poststalina Soveta Unio kaj ĝiaj aliancanoj). Sekvis forta aplaŭdo, delegitoj venis por gratuli al la reprezentanto de UEA, kaj tiam la Konferenco estis fermita. En sia viveca raporto pri la ŝtor-



”En la Estraro regas preskaŭ ĝena unuanimeco” (Tonkin): Estraranoj C. Støp-Bowitz, F. Szabó-Felső kaj W. Bormann
(Fotoj de P. Peeraerts kaj S. MacGill)

KUNSIDO DE LA ESTRARO DE UEA:

UEA en Nov-Jorko kaj Budapeŝto?

LA DEMANDSIGNO titola koncernas pli Budapeŝton ol Nov-Jorkon. En sia kunsido inter la 23a kaj 25a de novembro, en la CO en Roterdamo, la Estraro de UEA definitivigis la antaŭajn planojn por starigi UEA-oficejon en Nov-Jorko. Jam estas luprenita oficejo, kies situo (777 United Nations Plaza, 7a etaĝo) tre bone taŭgas por la ĉefa el la komencaj taskoj — prizorgado de la informlaboro kaj kunlaboraj rilatoj ĉe la diversaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj. Meze de ĉi tiu monato okazos la oficiala inaŭguro de la nov-jorka oficejo, kaj ni revenos kun pli da detaloj pri tio en unu el niaj proksimaj numeroj. Budapeŝta oficejo de UEA devus realiĝi kunlabore kun Hungara Esperanto-Asocio. Jam okazis diversaj sondoj kaj pretiĝis detalaj planoj, sed antaŭ ol definitivigi la decidon pri la ekfunkcio de la oficejo necesas plia detaligo de kelkaj teknikaj kaj financaj aspektoj de la entrepreno. En sia venonta kunsido (inter la 28a kaj 30a de marto 1980) la Estraro retraktos la demandon. Jam estas precizigite, ke la budapeŝta oficejo okupiĝus precipe pri la eldona kaj faka agado.

En la estrara tagordo estis ankaŭ: financaj evoluoj de ĉi tiu jaro (ĝenerale bonaj), buĝetoj por 1980 kaj 1981, redakta politiko de la revuo *LPLP*, grafika finpretigo de *Plena analiza gramatiko* (ĝi iros al la presejo frue en 1980), kotizoj de la junaj TEJO-membroj (v. la paĝon 213), stato de la antaŭa projekto pri nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*, nova Statuto de UEA (pri kiu nun okazas la ĝenerala voĉdono) kaj tiel plu, ktp. Parton de la kunsido partoprenis du LKK-anoj el Stokholmo (U. Luin kaj R. Lindblom). La Estraro tre detale diskutis plurajn ideojn pri refreŝigo kaj renovigo de la ĝenerala kongresa programo. Paralele kun la estrara kunsido pluraj aliaj invititoj (H. Bakker, A. Brennan, R. Corsetti, B. Moon, U.J. Moritz, J.C. Wells) diskutis la manierojn, kiel en Stokholmo trakti la kongresan ĉeftemon ”Diskriminacio”. Detala raporto pri tiu diskuto aperos en la januara numero. Abunde estis traktitaj ankaŭ la planoj por la postaj kongresoj (eĉ ĝis 1987). Tuj post la estrara kunsido kunvenis la Komisiono pri Kulturo. Ankaŭ al tiu temo ni klopodos reveni poste.



Kunsidaj protokoloj kreigas surloke: La direktoro V. Sadler diktas, dum la estraranoj Maertens kaj Grattapaglia atentas.

La forto de la historio

KIAM MI NASKIĜIS, Esperanto estis 37-jara. Kiam mi eklernis Esperanton ĝi estis 50-jara (kvankam mi ne sciis tion). En 1947 Esperanto estis 60-jara, kaj hodiaŭ ĝi ekzistas jam 92 jarojn kaj proksimiĝas al sia centjara jubileo.

Tio signifas, ke la lingvo Esperanto havas historion pli longan ol estas la memoro de iu ajn vivanta parolanto de la lingvo. Venis, iris, vivis kaj mortis sennombraj esperantistoj, el kiuj ne malgranda nombro suferis aŭ pereis kiel martiroj pro la fakto mem, ke ili parolis nian lingvon kaj aktivis en nia movado. Sennombraj individuoj, en niaj grupoj aŭ, ofte, en kompleta izoleco, dediĉis sin al Esperanto laŭ sia maniero — eble verkis, kiel Pastro Ricci en Ĉinujo, epopeon; eble tradukis la tutajn *Fratoj Karamazov* kaj *Milito kaj paco* seneldone; eble varbis kelkajn amikojn kaj instruis la lingvon en sia hejmo; eble varbis la aprobon de sia sindikato aŭ eklezia aŭtoritato; sed neniam ĉesis agado kaj agitado por la Internacia Lingvo.

Nia historio konis multajn fenomenojn, kiuj lasis sian spuron en nia tradicio. Jam la rapida akirado de plurcent adeptoj post la eldoniĝo de l'Unua Libro estis rimarkinda. Mecenatoj kiel Trompeter aperis, sed ankaŭ la plej malriĉaj homoj ĝis hodiaŭ ne hezitis kontribui finance al la disvastigo de la lingvo. La lingvo ne restis en Eŭropo sed baldaŭ alvenis en landoj malproksimaj kiel Ĉinujo kaj Japanujo.

La Ido-krizo en 1907 liberigis la lingvon de tiuj, kiuj volis ludi pri ĝi anstataŭ labori por ĝi, kaj la fondo de UEA en 1908 lanĉis la praktikan uzadon de Esperanto, kiu triumfe portis ĝin trans la Unuan Mondmiliton. Du fenomenojn vidis la postmilita periodo: la ekfloro de vere matura literaturo originala kaj tradukita; kaj la entuziasmo por Esperanto, spekulanta la leviĝon de internacia socialismo, en la laboristaro, kiu starigis sian propran movadon. Tiu lasta siaflanke kuntrenis persekutadon de Esperanto kaj esperantistoj fare de forte naciistaj registaroj.

Post la Dua Mondmilito la movado travivis la Rezolucion de Unesko, la eldonadon kaj eldonaĵojn de *El popolo Ĉinio*, la renaskiĝon de la movado en Sovetunio, la unuan Universalan Kongreson en Azio (kiu allogis al Esperanto multajn junajn japanojn), la parlamentan agadon en okcidenta Eŭropo, eldonon de *La Nobla Korano*, kaj aliajn aferojn, eble ankoraŭ tro aktualajn por vidiĝi en historia kunteksto.

Esenca trajto de ĉio ĉi estas la dediĉiteco de ordinaj homoj, ne nur al la koncepto de interhoma komunikado pere de neŭtrala lingvo, sed al la lingvo Esperanto mem. En kiom da geedziĝoj kaj familioj Esperanto

jam estis aŭ la unua lingvo aŭ egalrajta lingvo apud la nacilingvo! Ne mankis eĉ komunumoj, inter kiuj Bona Espero en Brazilo estas la plej nova kaj plej sukcesa, kie Esperanto estis la ĉefa lingvo. Multaj infanoj ricevis ĝin kiel unuan lingvon. Dum pli ol 90-jara senĉesa uzado, Esperanto ŝanĝiĝis de lingvo artefarita en lingvon naturan, kaj tion ni neniam forgesu. Ĝi ekzistas dank' al siaj sociaj portantoj estintaj, estantaj kaj estontaj.

Dum ni daŭrigos niajn laborojn por konvinki la ceteran mondon pri la grandega kaj ĉiam kreskanta neceso de libera, seninhibicia, kaj antaŭ ĉio rekta interkomunikado je ĉiuj tavoloj kaj niveloj, ni neniam perdu la fortecon, kiun la lingvo akiris iom post iom per la konstruado de historia tradicio. Ĉiu kulturo rezultiĝas de la pasinteco, kaj tio same validas pri la kulturo Esperanta.



William Auld:
Serenaj pensoj malantaŭ zorga mieno.

Sen la konvinkiĝo kaj praktika solidareco de siaj nekalkuleblaj centmiloj da parolintoj kaj parolantoj, Esperanto jam delonge estus malaperinta. Anstataŭ tio, ĝi estas parolata kaj uzata; pro tio ĝi estas la kultura posedaĵo de siaj uzantoj. Proponante ĝin kiel la solvon de la lingva ĥaoso en internaciaj rilatoj, ni proponas nek skizon nek koncepton, sed fortan realaĵon.

La esenco de la historio estas eterna ŝanĝiĝo. Nek la lingvo Esperanto nek ĝia pozicio en la mondo restis tia, kia ĝi estis en 1887, aŭ en 1920, aŭ en 1950. Kiom kreskis, ekzemple, la literaturo en Esperanto! Baldaŭ ne plu eblas diri (kiel oni flustras kaj kredas pri prof. Waringhien), ke iu homo "legis ĉiun libron eldonitan en Esperanto". Eĉ publikigi bibliografion kompletan de la eldonaĵoj en Esperanto eniris, laŭ mia opinio, la teritorion de la neeblo.

La aktuala ŝanĝiĝadas, la cirkonstancoj politikaj kaj sociaj ŝanĝiĝadas; sed la preterpasado de la historio nur plifortigas la realecon de Esperanto kiel unu el la vivantaj lingvoj de la mondo.

W. Auld

Reallernejo de Zamenhof

LA PUBLIKIGO en 1977 de la verko titolita *Halina-dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof* malfermas esplorendan terenon al zamenhofologoj. Temas pri faksimila eldono de tajpe kopiitaj dokumentoj rilate la mezgradan kaj universitatan edukadon de Ludoviko Zamenhof. La kopiado de la ruslingvaj tekstoj kaj ties traduko en Esperanton estis entreprenita de Halina Edelbaum, varsovianino, kiu trovis la materialon en la oficialaj arkivejoj de la varsovia Dua Vira Gimnazio kaj la Universitato de Varsovio.

N.Z. Maimon, en sia recenzo de la verko (*Esperanto*, novembro 1978, p. 200), rimarkigas, ke "pro manko de dokumentoj, ni preskaŭ nenion sciis pri la internaj kondiĉoj en la rusaj altlernejoj" kaj li aldonas, rilate la *Halina-dokumento*, ke "detala analizo estas afero de fakuloj." Trafoliuminte tiun interesvekan libron, mi bedaŭris, ke pedagogia fakulo, kun specialaj scioj pri la edusistemo kaj sociologio de la 19a-jarcenta Rusa Imperio, ne verkis apartan komenton, por ĵeti pli da lumo sur tiujn aspektojn de la vivo de la adoleska Zamenhof dum la jaroj koncernataj de tiuj dokumentoj.

Vorto ofte aperanta en la kopiitaj lernejaj dokumentoj, en la verkoj de Zamenhof mem, kaj ankaŭ en biografioj pri li, estas "reala", uzata adjektive en esprimoj kiel "reala lernejo, reala gimnazio" aŭ kiel la unua elemento en la kunmetaĵoj "reallernejo, realgimnazio". Jen du citaĵoj el verkoj de Zamenhof, montrantaj la kuntekston, en kiu tiuj terminoj estas uzataj.

"...el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion..." (Letero al Borovko, OV, p. 418)

"En la jaro 1869 mi eniris en la Bialistokan realan gimnazion... En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de germana lingvo en la reala gimnazio." (Letero al Michaux, LZ, vol. 1, n-ro 92, p. 111-112) Aŭtoroj de zamenhofaj biografioj nomas la institucion "reala lernejo" aŭ "reallernejo", sed unu el la varsoviaj gimnaziaj dokumentoj enhavas la esprimon "Bjelostoka Reala Gimnazio" (HD, p. 66-67).

Ankaŭ "reala" estis unu el la varsoviaj lernejoj, kie Marko Zamenhof, la patro de Ludoviko, oficis. Denove ne estas akordo inter la biografioj; unuj nomas ĝin lernejo, aliaj gimnazio. La vera nomo estas Varsovia Reala Gimnazio, atestita per la taglibro de la Pedagogia Konsilantaro de la gimnazio, kiun Ludoviko frekventis (HD p. 18-19).

Kion do, signifas la vorto "reala" en lerneja kunteksto? Konsultante *Plena ilustrita vortaro* (PIV) oni trovas, ke "reala" havas kvar signifojn:

1. "efektive ekzistanta kaj kontrolebla (kontraste kun: imagata, ŝajna)"
2. "havanta la ecojn de ĉio materia (kontraste kun: ideala)"
3. juro: "koncernanta aĵon (kontraste kun: persona)"
4. matematiko: (pp. nombro) "pozitiva aŭ negativa aŭ nula".

Ĉe la artikolvortoj "lernejo" kaj "gimnazio" ne estas registritaj kunmetaĵoj kun "real-". Reirante en la historion de "reala" en Esperanto, oni trovas, ke tiu ĉi zamenhofa vorto estis oficialigita antaŭ 70 jaroj. Ĝi havas jenajn etnolingvajn tradukojn en la *Unua aldono al Universala vortaro* (1909): F. **réel**, A. **real**, G. **real**,

Reallernejo en Bjalistoko: "En la jaro 1869 mi eniris en la Bialistokan realan gimnazion; sed post du monatoj mi devis eliri pro grava malsano. . . ; en 1870 mi eniris denove kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj. . . En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, . . . kaj poste mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion". (Zamenhof: Letero al Michaux, 1905)



L.L. Zamenhof kiel varsovia gimnaziano en 1875. Li finis la gimnazian lernadon en 1879 kaj iris al Moskvo por studi medicinon.



wirklich, R. real'nij, P. realny. Estas evidente, ke en PIV mankas difino aplikebla al tipo de lernejo.

La nacilingvaj Esperanto-vortaroj, kiuj registras "reala" kun eduka signifo, estas preskaŭ ekskluzive ĝermanaj: skandinavaj kaj germana. Kunmetitaj vortoj kun **real-** estas tradukitaj jen per esprimoj kiel "mezgrada lernejo, mezgrada ekzameno", jen per la uzo de "real-" kiel Esperanta morfemo: "reallernejo, realklaso, realfako, realliceo". Krom ĝermanaj lingvoj (kun la rimarkinda escepto de la angla), la radiko **real-** estas uzata ankaŭ en slavaj lingvoj, en kies Esperanto-vortaroj, la etnolingvaj vortoj estas tradukitaj per "reallernejo, realliceo". El tiu vortuzo oni povas konkludi, ke temas pri speco de mezgrada lernejo, gimnazio aŭ liceo, sed ankoraŭ ne estas klare, kial ili nomiĝas "realaj".

La etimo de "reala" en Esperanto estas la slavaj kaj ĝermanaj formoj de la latina adjektivo **realis**, derivita de la substantivo **res**, "aĵo". La adjektivo en la neŭtra plurala formo, **realia**, en la kunteksto de pedagogiaj aferoj, estas mallongigo de la esprimo **realia studia**, kiu kontrastas kun **humaniora studia**, "humanismaj studoj". Kelkaj eŭropaj lingvoj alprenis **realia** sen asimilado kaj substantivigis ĝin. En *Svensk-esperantisk ordbok* ĝi estas tradukita per "realaĵoj; realaj scioj", dum en la suplemento de tiu vortaro, la Esperanta ekvivalento estas "vivo kaj institucioj". La germana **Realien** kaj la hungara **reáliák**, ambaŭ asimilitaj formoj de **realia**, estas difinitaj en vortaroj de tiuj lingvoj kiel teknikaj, matematikaj kaj natursciencaj studobjektoj, kontraste kun humanismaj studobjektoj kiel la lingvoj kaj literaturo. En la angla, **realia** havas tute alian signifon: "objektoj kaj agadoj uzataj por rilatigi enlernejan instruadon al la reala vivo, precipe pri popoloj studataj. La esprimo "real school" ne ekzistas en la angla lingvo. Marjorie Boulton, en sia anglalingva biografio pri Zamenhof, skribas, ke Ludoviko estas akceptita en la "**Science School**", "scienca lernejo", iom pli taŭga ekvivalento por lernejo apartenanta al fremda edukistemo. En la Esperanta versio de la sama biografio, troviĝas pli da informoj.

"En aŭgusto 1869, iom antaŭ la deka naskiĝdatreveno, laŭleĝa aĝo por tiu promocio, Lazaro eniris la reallernejon en Bjalistoko. Tie oni ne studis la grekan lingvon aŭ preparis sin por universitato, sed judo povis pli facile lerneĵiĝi." (Boulton, 1962, p. 23)

En alia biografia verko pri Zamenhof, Maimon (1978, p. 144) piednote klarigas, ke "reala gimnazio" estas "lernejo, kiu donas duagradan instruadon sen klasikaj lingvoj." La esprimo "klasikaj lingvoj" signifas, ke ankaŭ la latina ne estas instruata en tiuspeca lernejo.

Kio, do, estis instruata en realaj lernejoj? Marko Zamenhof ja sciis, ĉar li instruis en du reallernejoj, unu en Bjalistoko, la alia en Varsovio, kaj ankaŭ en la tiea Veterinara Instituto. Li okupiĝis pri modernaj fremdaj lingvoj kaj la geografio. Zamenhof en sia letero al Michaux citita ĉi-supre, mencias specife, ke lia patro instruis la germanan lingvon en la reala gimnazio.

La koncepto de la reala lernejo, t.e. la moderna ĝenerala lernejo, naskiĝis en Germanio en la mezo de la 17a jarcento. La celo de tiuspeca edukejo estis prepari lernantojn por la komerco, industrio, agrikulturo kaj aliaj praktikaj sferoj. Nur malfrue en la 19a jarcento ĝi kvalifikis lernantojn por universitatoj. El Germanio la reallerneja sistemo disvastiĝis unue al Aŭstrio kaj poste al la orienta Eŭropo.

Nun estas eble formuli la kvinan signifon de "reala".

5. pedagogio: koncernanta mezlernejon (reala lernejo, reala gimnazio, reala liceo), en kiu estas instruataj la modernaj lingvoj (kaj ne la antikva greka kaj la latina), la sciencoj kaj matematiko, kaj aliaj praktikaj studobjektoj; tiuj teknikaj kaj natursciencaj studobjektoj estas konataj kiel "realaĵoj" aŭ "realaj fakoj", kontraste kun humanismaj studoj kiel lingvaj kaj literaturaj studobjektoj karakterizaj de la klasika aŭ filologia lernejo.

Bernard Golden

Konsultitaj verkoj

Boulton, Marjorie: *Zamenhof, Creator of Esperanto*. London, 1960.

Boulton, Marjorie: *Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto*. La Laguna, Hispanio, 1962.

HD = *Halina-dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof*. Kun komentario de Naokazu Kawasaki. Ĵuntaro Iŭaŝita, Tokio, 1977.

Jansson, Sam Owen; Linden, Frits; Gerdman, Birger: *Svensk-esperantisk ordbok*. Stockholm, 1934.

LZ = *Leteroj de Zamenhof*. Prezento kaj komento de Prof. G. Waringhien. Vol. I (1901-1906). Paris, 1948.

Maimon, Naftali Cvi: *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio, 1978.

Maimon, N.Z.: "Surprizaj novaĵoj pri Zamenhof." (recenzo de *Halina-dokumento*, *Esperanto*, novembro 1978, p. 200).

OV = *Originala verkaro* de L.L. Zamenhof. Kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Leipzig, 1929.

PIV = *Plena ilustrita vortaro*. Paris, 1970.

Waringhien, Gaston: "Zamenhof Lazaro Ludoviko." En *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, p. 23-26. London, 1960.

Wiesenfeld, Edvardo: "Antaŭparolo de l'redaktinto." En *Verkoj de FeZ*, p. 7-13. Budapeŝto, 1935.

Vilborg, Ebbe: *Supplement till Svensk-esperantisk ordbok*. Malmö, 1975.

Zamenhof, Leono: "El la biografio de d-ro L.L. Zamenhof." *Universo*, II, 6, p. 170-178, 1910. Represita en *Dokumentoj de Esperanto* kunmetita de d-ro A. Möbusz, p. 15-21. Berlin, 1921.

Ziolkowska, Maria: *Doktoro Esperanto/ Doktor Esperanto*. Tradukita de Isaj Dratwer. Warszawa, 1959.

Privat, Edmond: *Vivo de Zamenhof*. Kvina eldono. Chorleywood, Rickmansworth, Herts, Anglio, 1967.

Pri la Esperanta metalingvo

KONCIZAN prezenton pri la verko de Wells* mi faris aliloke. El inter la pluraj nediskuteblaj meritoj de la verko mi elektas nun nur unu: ĝian principan *metalingvistikan* valoron, el kiu vidpunkto mi konsideras la verkon pionira. (Kelkfoje mi jam esprimis mian senpaciencon ĉi-teme, kp. LF.1971.dec.13-14. kaj HdE 1972.4-5:4.)

1. La **metalingvistika funkcio** de la lingvo estas unika fenomeno, kiam kaj la objekto kaj la rimedo de la esploro estas la sama lingvo. Tial la metalingvo, kiel subsistemo de la lingvo — funkcia laŭ la sama mekanismo, sed konsistanta el speciala leksiko, el la terminologia retaro — esence diferencigas la lingvistikan metalingvon disde la alisciencaj terminologioj. (Tiu konstato validas eĉ se ni konsideras la pruntaĵojn, enfluantajn en la lingvistikan termino-leksikon el aliaj



Iniciato de la scienca esplorado de Esperanto: D-ro John C. Wells, aŭtoro de la verko "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto"

sciencoj, la t.n. terminologian kontaminacion, ĉar — konsente kun Mounin (*Dictionnaire de la linguistique*, Paris, 1974) — ĉi-terminoj adaptiĝas al la terminosistemo de la akceptanta nova disciplino.)

2. La metalingvistiko havas siajn problemojn, kelkfoje tre malfacile solveblajn:

2.1. Por sin priskribi (aŭ kiel proponas Wells — *deskripti*) estas preskaŭ neeviteble, ke la metalingvo de diversaj lingvoj pli-malpli malsamu. La ĉefa kaŭzo estas, ke en certa(j) lingvo(j) estas fenomenoj specifaj, mankantaj en alia(j) lingvo(j), ekz. sandhi en la hindia, aŭ la umlaŭto en la germana.

2.2. Influas la metalingvon de certa konkreta lingvo ankaŭ la tradicio: la sama fenomeno en iu lingvo

havas malsaman nomon en alia, ekz. la morfemo ĉe francaj kaj ĉe sovetaj aŭ usonaj lingvistoj, ablaŭto aŭ apofonio en la germana aŭ franca metalingvo respektive.

2.3. Dependas la metalingvo ankaŭ de la ĝenerallingvistika koncepto de la aŭtoro, de lingvistika skolo al kiu li apartenas. **R.K. Hartmann** (*The Language of Linguistics*, Tübingen, 1973) ekz. distingas ok terminologiajn modelojn laŭ ok diversaj skoloj: Saussure-a, praga, glossemantika, deskripta, genera-transforma, tagmemika, sistema kaj stratifikacia.

3. Oni nepre menciui, ke la scienco (la metalingvo) nur deskriptas la lingvon, sed ne kreas ĝin: la scienco ne konstruas la lingvon, nur transformas ĝin en esplorobjekton.

3.1. La problemo de la lingvodeskripto konsistas el la fakto, ke la lingvo samtempe prezentiĝas kiel: a) ilaro de ekkono, b) objekto de esploro, kaj c) rimedo de esploro. Tiu triopo — populare dirite — en la verko de Wells prezentiĝas jene: a) ĝi prezentas Esperanton, b) deskriptas ĝin science, kaj c) uzas ĝin mem kiel deskriptilon.

3.2. Tiu ĉi triopo en la verko realiĝas ne simetrie.

3.2.1. La libro adresiĝas al tiuj, kiuj jam regas la Internacian Lingvon. Tial la celo (a) plenumiĝas nur tiom, kiom ĝin postulas la celoj (b) kaj (c). Sekve: ĝi ne estas ia "lernolibro" el kiu oni povus ellerni la gramatikon de Esperanto, kvankam kelkaj segmentoj (ekz. la fonema sistemo) estas sufiĉe profunde traktitaj. Sed la prezento de la Esperantaj lingvaj faktoj estas tiomgrade klare kaj sisteme farita, ke en ĝia spegulo tiuj, kiuj ĝis nun kredis, ke ili konas la Esperantan gramatikon konvinkiĝos, ke ilia scio (kaj ke la fontoj, el kiuj ili ĉerpis tiun scion) ne ĉiam estis ĝustaj kaj veraj.

3.2.2. La punktoj (b) kaj (c) ne estas disigeblaj. Ili pravas, ke: a) Esperanto kiel vivanta, funkcia lingvo havas sian propran metalingvon. Tio signifas, ke: b) Esperanto estas science deskriptebla, ke en la deskripta aparato de la Internacia Lingvo povas funkcii tiel la elementoj de la ĝenerala, kiel la elementoj de la speciala metalingvo.

4. En la terminologia sistemo resumiĝas kaj fiksiĝas la rezultato de longa esplorkurento je certa tempolimo. La terminoj servas por koncepti, klasifiki, difini, ordigi, sistemigi ĉion, kion ĝis tiu periodo oni ekkonis pri la esplorata objekto. Aliflanke, la terminoj, kiel elementoj de kompakta sistemo, ofte servas ankaŭ por malkovri novajn konojn pri la esplorataĵo. Kiam ekz. J. Baudouin de Courtenay "malkovris" la abstraktan elementon de la parolo kaj nomis ĝin *fonemo*, per tio li iniciatis tutan sistemon en la lingvodeskripto, la t.n. *alo-emikan sistemon*, kiu generis tiajn terminojn, kiel ekz. *grafemo*, *morfemo*, *leksemo* k.a., kiuj — siavice — konstruigis la triopojn *fono*—*fonemo*—*alofono*; *morfo*—*morfemo*—*alomorfo* k.a.

* *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, de John C. Wells. Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Prezo: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

5. La titolo "lingvistikaj aspektoj" estas do tre modesta. La verko estas multe pli: iniciato al la scienca esploro kaj fundamento de la Esperanta metalingvo. El tiu vidpunkto oni povas nur bedaŭri, ke la aŭtoro ne kompilis pli kompletan "Indekson de terminoj". (p. 75 – 76).

6. En la prezento de la ĝeneral-lingvistikaj aspektoj de Esperanto la aŭtoro citas dekojn da diverslingvaj ekzemploj, inter ili (tre laŭdinde) ankaŭ la t.n. "ekzotikajn" (ekz. eskiman). Kiam antaŭ kelkaj jaroj la subskribinto komparis la morfeman sistemon de Esperanto kun kelkaj similaj lingvoj, ĝi elvokis la malican, primokan rimarkon de kelkaj famaj esperantistoj (kp. LF, 1974.24:5-8. kaj LF 1975.29:11).

Per tiu vastskala konfronta komparado la aŭtoro volis kaj sukcesis pruvi, ke Esperanto ne estas ia kuriozaĵo,

iu mirskarabo inter la ceteraj lingvoj, sed ĝi, kiel ĉiu alia funkcia lingvo, havas siajn internajn leĝojn, kiuj parte kongruas aŭ similas, kaj parte ne, kun la ceteraj lingvoj. Per aliaj rimedoj Wells pruvis la samon, kion konstatis ankaŭ D. Brozović en sia elstara studo pri la tipologia loko de Esperanto inter la diversaj lingvotipoj (kp. *Interlingvistika simpozio*, Zagreb, 1976: 33-81). Ne temas do pri "la pozicio de aŭtomobilo en besta tipologio", sed pri tio, kion la eminenta hungara lingvisto G. Bárczi diris: "Estus infanece pruvadi la valorojn de iu lingvo per la diskriminado de la aliaj. Estus infanece kaj absolute false. Ni ne volas diri, ke iu lingvo valoras pli ol la alia, nur tion, ke ĝi estas *alia*. Kaj ĝuste tiu *alio* igas ĝin valora koloro en la bunta bildo de la homa kulturo."

Prof. d-ro István Szerdahelyi

Recenzoj

Pli Lebrun ol Tolstoj

Recenzas Vladimir V. Samodaj (Soveta Unio):

Leo Tolstoj; La homo, la verkisto kaj la reformisto, de Victor Lebrun (1882-1979). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1978. 402p., plus 23 paĝoj da bildoj. 20cm. Plejado 10.

Ŝajne, la libro multflanke pritraktas la personecon de Leo Tolstoj. Jen li aperas kiel verkisto, jen kiel religia reformisto, moralisto, scienculo, arta kritikisto, sociologo, popola kleriganto, filozofo, terkulturisto. Jen Leo Tolstoj estas montrita ĉe sia skribotablo, jen en la familia medio, jen inter siaj adeptoj. Tamen, restas post la tralego de la libro iu sento de nesatiĝo, de nekomplete respondita demando: kio do estas Leo Tolstoj?

La volumo konsistas el du partoj. La unua – "Majstro kaj disĉiplo" – rakontas pri la vivo de la aŭtoro mem, pri tio, kiel li konatiĝis kun la malpermesitaj socialaj verkoj de Tolstoj, kiel li iĝis adepto de la granda pensulo. Tie do temas unuavice pri Victor Lebrun, la aŭtoro de la libro, kaj pri la influo de Leo Tolstoj al ties pens- kaj mens-evoluo. Kaj nur lige kun la aŭtoro, dua-vice, temas pri Leo Tolstoj, pri lia rilato al diversaj vivproblemoj sociaj, pri liaj homaj trajtoj, pri lia laboremo. Sufiĉe bone estas montrita la vivtragedio de Leo Tolstoj, netolereblo de lia familia vivo, nekomprene de tiu geniulo flanke de liaj familianoj – la edzino kaj la gefiloj. Tio kaŭzis finfine, post multjara anima suferado kaj tolerado, la foriron, la fuĝon de maljuna Tolstoj el sia propra hejmo kaj la morton fremdloke.

En la dua parto, titolita "Kvindek jarojn poste – rezultoj kaj direktivoj" estas traktata la diversflanka socia agado de Tolstoj kaj lia influo al la publika opinio tiutempa. Tamen, dum legado de tiu parto, ofte aperas la sento, kvazaŭ Lebrun esprimas pli sin mem, siajn personajn vidpunktojn pri diversaj facetoj de la vivo, ol transdonas aŭ klarigas la veran instruon de Tolstoj.

Certe, la aŭtoro plenrajtas komenti la instruojn de persono pri kiu li verkas, esprimi sian subjektivan opinion, sed ne tiel forte anstataŭigi la pensojn de la pristudata personeco per siaj propraj.

Do, rezulte oni povas kompreni, ke la libro malpli prezentas la grandan majstron Tolstoj, ol lian disĉiplon kaj adoranton Lebrun, kiu, cetere, dum ioma tempo estis persona sekretario de la verkisto.

En la libro estas publikigitaj leteroj de Tolstoj, adresitaj al Lebrun. Oni povas konstati, ke plurloke la esperantlingva traduko de la leteroj el la ruslingva originalo estas neĝusta kaj neklara. Ĝenerale, la lingvaĵo de la libro estas flua, ĝuinda, sed foje leganton stumbligas gramatikaj malĝustaĵoj.

Malgraŭ tiuj kritikaj rimarkoj, certagrade subjektivaj kaj eble iom severaj, la konkluda opinio estas jena: la libro estas interesa, instrua, kaj meritas atenton de la legantaro. Ne ĉion diritan en ĝi oni povas akcepti, tamen ĝi vekas interesigon pri la personeco de Leo Tolstoj, pri lia verkaro belarta kaj sociala. La orientigon en liaj verkoj helpas la bibliografia ĉapitro "La literatura heredaĵo". Intereson vekas ankaŭ la fakto, ke la libron verkis ne flanka postmorta esploranto, sed homo koninta Tolstoj persone, loĝinta kaj laborinta ĉe li.

Mendu ĉe UEA: 45,00 (por Nederlando 46,80) gld., plus sendokostoj 10%.

Helpo al eksteruloj

Recenzas P.G. Forster (Malavio):

Esperanto and international language problems; A research bibliography (1967), Humphrey Tonkin (1939-). Washington: Esperantic Studies Foundation, Inc., 1977 (4a reviziita eldono). 3+45p. 21cm.

Jen nova eldono de la nun bone konata esplorbibliografio de Esperanto kaj internacilingvaj problemoj. Ĉi

tiu kvara eldono, denove reviziita, estas efektive reverkita, kaj precipe pli ampleksa ol antaŭe estas la pritrakto de la Esperanta literaturo.

La bibliografio, en la angla lingvo, aparte celas usonajn interesitojn pri la problemoj. Ĝi speciale emfazas anglalingvajn librojn, sed ankaŭ mencias fontojn en Esperanto kaj en aliaj lingvoj.

Dum longa tempo estis manko de verkoj, kiuj prezentas la Esperantan kulturon al ekstera publiko. Ĝenerale tiuj informoj estis haveblaj nur al tiuj, kiuj jam scipovas legi Esperanton. La bibliografio helpas al serioza scienca esplorado pri multaj aspektoj de Esperanto kaj la lingva problemoj, precipe en Usono, kie tio ŝajne estas kreskanta studintereso. La libro cetere estas utila ne nur pro la informoj pri temoj jam pritraktitaj en la literaturo. Ĝi indikas ankaŭ la mankojn, kaj pro tio helpas difinon de originalaj esplortemoj.

La sola ebla manko estas, ke la verko apenaŭ tuŝas la "konkurintajn" aŭ "skismajn" projektojn. Kvankam sociologie ili apenaŭ havas gravan signifon, ili estas interesaj el la vidpunkto de la historio kaj de la teorio de interlingvistiko. Estus utile, se sekcio pri tiu temo estus aldonita ĉe nova eldono.

Mendu ĉe UEA: 3,60 (por Nederlando 3,74) gld., plus sendokostoj 10%.

Vere tre bona libro

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando);

Infanoj en la mondo, de G.H. Mathiasmoen. Desegnis Eli Bø kaj Bente Giset. Trad. el la dana Eliza Kehlet. Kopenhago: Dana UNICEF-Komitato, 1979. 32p. Kolorilus. 30cm. ISBN 87 87476 21 5.

Tiun ĉi grandformatan koloran libreton eldonis la Dana UNICEF-Komitato okaze de la Internacia jaro de la

 *infanoj en la mondo*



Infano. Ĝi estas celita por infanoj en riĉaj landoj kiel Danlando. Enestas informoj pri tio, kion ĉiuj homoj bezonas: akvo, nutraĵoj, vestoj, loĝejo, sano, lernejo, laboro, sekureco, — kaj ankaŭ pri la manieroj en kiuj tiuj bezonoj estas — aŭ ne estas — kontentigataj en riĉaj kaj malriĉaj landoj. Krome, en maniero kom-

prenebla eĉ por junaj infanoj, estas priskribita la nejusta internacia labordivido laŭ la ekzemplo de iuj produktoj: bananoj, koton, kakao. Fine, troviĝas en ĝi kelkaj

ekzemploj de evoluhelpo praktikata de Danlando kaj pri la laboro de UNICEF.

La stilo kaj la vortuzo estas bone adaptitaj al elementlernejaj infanoj. (Sed: la medicina fakvorto "salubra" anstataŭ "saniga", parolante pri nutraĵoj, ne devus aperi en porlaika verko, do certe ne en porinfana!)

La tre simpatiajn kolorbildojn desegnis du 14-jaraj infanoj. Tre rekomendinda libro! Infanoj konantaj Esperanton montru ĝin en sia lernejo kaj klarigu pri ĝi en sia klaso. Vere bona.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld., plus sendokostoj 10%.

Majstra dialoga tajlo

Recenzas Clelia Conterno (Italio):

Marvirina luno (1974), Joan Pomfret. El la angla trad. membroj de Morecombe Bay Esperanto-Societo. Morecombe, 1978. 143p. Ilus. 20cm.

Kial oni aĉetas Esperanto-libron? Por helpi al la Movado, por komplezi amikon, por ĝin posedi, por ĝin legi (ve, lasta en listo de kialoj).

Al tiu ĉi maldika tavolo de aĉetantoj, kiuj bezonegas romanojn kaj ricevas eseojn pri esperantologio, iru la ne senpeka, sed almenaŭ inde legebla *Marvirina luno*. Ĝin oni ne povas flankenmeti ĝis la lasta paĝo, superante ĉiujn rifojn kiel la tajdoondo, vera ĉefrolanto de la romano, ilin superas en sia fatala aliro al la sovaĝa "plata, ventotaŭzita terlanga kiu estas Sunderland".

La merito venas al la aŭtorino de la originalo, Joan Pomfret, kiu plume pentras la dekokjarcentajn pejzaĝojn, homojn, aventurojn tiel profesi-verkiste, per tia tajlo de la dialogoj, per tia dozado de la efikoj, ke la leganto ne plu atentigas la modestecon de la presado kaj bindo, aŭ la kelkajn krudaĵojn de la traduko (kial angle **chapter** anstataŭ ĉapitro?). Cetere, pri tio kun laŭdinda sincereco atentigas la grupo de la tradukintoj en sia enkonduko. Kaj mi emus alproksimigi, por komparo tute ne malfavora, la verkon de Joan Pomfret al unu el la plej bonaj de Daphne Du Maurier, *The King's General* (La generalo de la reĝo). Ankaŭ la heroino de Joan Pomfret vivis kaj taglibris en foraj tempoj, kvankam temas nur pri malriĉa knabino servanta en gastejo ĉe marhaveno. Same, la heroo de *Marvirina luno*, la ŝipestro Buck Anderby, estas bela, vireca, vivĝoja kaj aventurema. Ankaŭ la intrigo plenas je neatenditaj okazoj, sorĉoj, vundoj, mortoj kaj amoj, laŭvice sovaĝaj kaj respektplenaj: ĉar ŝi, Joanna, baraktas inter sia pasio al Buck, nefidela kaj lupeca, kaj sia ŝato-amo al Richard Thorpe, nefortika ĝentila bienulo. Al ĉi-lasto ŝi edziniĝas, kaj la renkonto, tro malfrua (ve, aŭ feliĉe?), kun la foje amita, nun ankoraŭ ŝin skuanta posedema personeco de Buck, fermas la romanon per majstre psikologia trakto.

Mendu ĉe UEA: 9,60 (por Nederlando 9,98) gld., plus sendokostoj 10%.

Avino-ursino, La, Giang Mi. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 46p. Kolorilus. 18cm. 88-Es-151P. Lerta knabino trompas ursinon, kiu volas ŝin manĝi. Prezo: 1,50 gld.

Bibliografio de la Esperanto-eldonaĵoj aperigitaj en Pollando 1945-1979, Irena Bednarz. Romo/Varsovio: Mozaiko, 1979. 29p. 24cm. Serio Bibliografia 1. Prezo: 5,40 gld.

Blankaj gardistoj, La, Dragoslav Heiligstein. El la kroata tr. Krešo Barkovič. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1980 (fakte 1979). 62p. Mimeo. Ilus. de Valo. 21cm. LJP-broŝuro 136B. Instruaj fabeloj pri la batalo inter bakterioj kaj blankaj globuloj de la sango. Prezo: 3,00 gld.

Blinda ermito, Maurizio Caprile. El la itala trad. Mauro Nervi. Pisa: Edistudio, 1979. 60p. 21cm. ISBN 88-7036-004-0. Helbildaj versaĵoj, pri sunradioj, vojaĝoj, amatino. Prezo: 9,00 gld.

Bona sinjorino, Eliza Orzeszkowa (1842-1910). El la pola trad. (1909) Kabe (ps. de K. Bein). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1979 (fotorepreso). 56p. 20cm. Novelo pri malriĉa orfino, kies prizorgon transprenas kaprica sinjorino. Prezo: 3,00 gld.

Einstein; La enigmo de la matematiko, Huberto Rohden. El la portugala trad. Délio Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1978. 134p. 21cm. Eseo pri la filozofio de Einstein, kaj pri la rilatoj inter la scienco kaj la mistiko. Prezo: 9,00 gld.

Enkonduko en la interlingvistikon. Red. T. Carlevaro kaj G. Lobin. Alsbach: Leuchtturm-Verlag, 1979. 263p. 21cm. ISBN 3-88064-073-4. Eŭropa Serio "Sennaciigita Scienco" 2. Referaĵoj de Szerdahelyi, Carlevaro, Frank, Sonnabend, Münnich kaj Zlatnar. Kun resumoj en la germana. Prezo: 33,90 gld.

En senvoja sovaĝejo, Jacob Maris. El la nederlanda tr. Rejna de Jong. Glasgow: Kardo, 1979. 24p. 20cm. Poemoj de eksa psikiatria paciento. Prezo: 8,10 gld.

Enuo, Lima Cipolatti. El la portugala trad. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Lab-C-Cip Ltda., 1978 (ne indikita). 14p. Ilus. 22cm. Foto-rakonto pri homo kun profunda angorsento. Prezo: 1,80 gld.

Esperanto laŭ amuz-metodo, Andrzej Pettyn (1937-). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1979. 224p. 21cm. Lernolibro intencita ĉefe por la koresponda kurso de PEA. Prezo: 6,00 gld.

Future of modern languages in the English-speaking countries, The, Humphrey Tonkin (1939-) kaj Grahame Leon-Smith (1941-). Rotterdam: UEA, 1979. 20p. 21cm. ED-18A. Prezo: 3,00 gld.

Gutaro, Avoto (ps. de A.W. Thomson, 1896-). Hastings: Esperanto Editions, 1979. 64p. 20cm. Poemoj en simpla lingvaĵo, kun postparolo de la aŭtoro pri poeziaj principoj. Prezo: 7,20 gld.

Historio de Esperanto 1887-1912 (1915), Z. Adam (ps. de Adam Zakrzewski, 1856-1921). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1979 (fotorepreso). 8+144p. Ilus. 21cm. La plej frua iom ampleksa historio de la Internacia Lingvo. Prezo: 9,90 gld.

Hund-bazaro; 33 hungaraj infanpoemoj. Red. Péter András Rados. El la hungara. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 68p. Ilus. de Flóra Holpert. 19cm. ISBN 963 571 041 0. Kun verkoj de i.a. Petőfi, József kaj Weöres, en traduko de Kalocsay kaj aliaj. Prezo: 10,20 gld.

Inkunabloj de Esperanto, La. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 1-bis. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1979. 283p. 22cm. Bindita. Bibliografia kaj historia studo pri la verkoj kolektitaj en *Unuaj libroj por esperantistoj*, kun aparte elĉerpa komparo inter la diverslingvaj eldonoj de la "Unua libro". Prezo: 30,00 gld.

Instrua amuzo (Krucvortenigmoj kaj humuro, vol. 2), Stano Marček kaj Stano Markovič. Martin, 1979. 36p. Ilus. 21cm. Prezo: 5,10 gld.

Kun gradaj paŝoj eksterlanden! Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 6. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1979. 427p. 22cm. Bindita. Verkoj, ĉefe leteroj, el la jaroj 1901-1904. Pli ol duonon de la volumo formas komentario, bibliografiaj notoj kaj fonaj dokumentoj de la sama periodo. Prezo: 30,00 gld.

Malriĉaj homoj (1917), Zsigmond Móricz (1879-1942). El la hungara trad. Károly Bodó (1933). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979 (fotorepreso). 36p. 23cm. ISBN 963 571 055 0. Novelo pri la sekvoj de militado al la psiko de soldato. Prezo: 2,50 gld.

Ne tiel sed ĉi tiel; Simplaj sugestoj por agrabla kontakto kun blinduloj (1974), Herman Van Dyck. El la nederlanda trad. J. Koning kaj aliaj. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1979. 32p. Ilus. 17cm. Prezo: 2,70 gld.

Poemoj, Maŭ Zedong (1893-1976). El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 68p. 22cm. Bindita. 1-Es-964S. Versaĵoj delikataj sed densaj je aludoj al la ĉinaj historio kaj literaturo. Abundaj notoj klarigas la enhavon. Prezo: 3,00 gld.

Pri Esperanta tradukarto, Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979. 71p. 20cm. Defendas la lingvan naturalismon (t.e. la enkondukon de neologismoj por anstataŭi vortojn plur-elementajn aŭ neprecizajn) kiel bazon de bona literatura traduko. Kun eseo, bibliografio kaj indeksoj de R. Haupenthal. Prezo: 11,70 gld.

Rakontoj pri fantom-spitantoj. Kompilis la Literatura Instituto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj. El la ĉina tr. Pandišo kaj I. Ko (1961). Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1979 (dua eldono). 90p. Ilus. de Ĉeng Ŝifa. 19cm. 10-Es-442P. Anekdotoj ĉerpitaj el diversaj antikvaj ĉinaj literaturaĵoj. Prezo: 1,80 gld.

Sarkasme kaj entuziasme, Masao Miyamoto (1913-). Toyonaka: La Kritikanto, 1979. 151p. 21cm. Kolektitaj eseoj pri la Esperantaj lingvo, literaturo kaj movado, de sperta kaj akrevida observanto. Kun postparolo de V. Benczik kaj bibliografio de ĉefaj verkoj de Miyamoto. Prezo: 24,00 gld.

Understanding among Africans: Linguistic isolation and linguistic communication, Claude Piron (1931-). Rotterdam: UEA, 1979. 16p. 21cm. ED-17A. Prezo: 3,00 gld.



Songpoemo pri ponto kaj aliaj kantoj. Kantas la koruso Hljómeýki. Piano de Jónas Ingimundarson. Tradukoj de B. Ragnarsson, S. Sigurdsson k.a. Islanda Esperanto-Asocio, 1979. 30cm. 33t/m. Duflanka. Stereofona. IEA-7901. Dek du islandaj kantoj. La impona titola kantato estis komponita honore al UEA okaze de la 62a UK en Rejkjaviko. Kun tekstoj sur la koverta. Prezo: 27,90 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj.** Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,- gld.**

Se vi estas june juna ...

MALFACILAS havi klaran bildon pri la aĝostrukturo de la Movado. Pri nur unu grupo ni scias la aĝon de ĉiu membro — la junularo. Temas do pri tiuj 343 membroj malpli ol 25-jaraj, el la entuta individua membraro (6215) de UEA fine de 1978. Ĵusa esploro pri tiuj gejunuloj malkovras, ke eĉ ne 30 estas malpli ol 18-jaraj. Ke mankas **junaj** gejunuloj ne estas surprizo por TEJO. De jaroj oni diskutas pri tio en niaj komitataj kunsidoj. En sia lasta kunveno, la Komitato de TEJO specife instrukciis al la Estraro ion entrepreni pri la demando.

La Estraro vidis en tio du ĉefajn problemojn: Unue, ke kvankam la Internacia Junulara Kongreso estas alloga por junuloj ĉiuaj, niaj eldonaĵoj pli taŭgas por pli aĝa gejunularo. La redaktoroj de TEJO-eldonaĵoj nun notas tiun konstataĵon kaj provas reagi al ĝi. Krome, ĉiu individua membro ekde nun ricevas ankaŭ la novaĵgazeton *Koncize* kun la ĝeneraltema revuo *Kontakto*, kio donos pozitivan servon aparte al la pli junaj membroj. La dua problemo estas la alta kosto de membreco en TEJO por nesalajratoj. En pluraj landaj sekcioj malpli aĝaj gejunuloj abundas kaj aktivas, sed tiu alta kotiza muro malinstigas ilin frue aliĝi al TEJO kaj partopreni la internacian movadan vivon. Pro tiu financa problemo, TEJO kaj UEA nun anoncas oferton, kiu estas almenaŭ la unua paŝo al bona solvo.

SPECIALA OFERTO AL MALPLI-OL-18-JARULOJ:

**Kotizu por unu jaro
— membriĝu
en TEJO dum du!**

En 1980, je trijara eksperimenta bazo, TEJO/UEA donas tiun avantaĝan oferton por novaj junaj membroj. Kiu unuafoje membriĝas en TEJO/UEA, estante inter la aĝoj de 10 kaj 18 inkluzive, aŭtomate ĝuos dujaran membrecon kontraŭ unujara kotizo. La sola postulo estas, ke samtempe kun la aliĝo, oni informu pri la preciza naskiĝdato.

Memoru, ke kune kun la jam menciitaj gazetoj, *Koncize* kaj *Kontakto*, ĉiu membro ricevas la Jarlibron de UEA, kaj membroj en kategorioj MA-K kaj DM-K ricevas jare 11 numerojn de la revuo *Esperanto*. Kvar periodaĵoj dum du jaroj, por unu kotizo — ne malbone! Kompreneble, ĉi tiu artikolo rekte varbos malmultajn gejunulojn, kiuj nun ne estas membroj. Ĉi tiu revuo malversajne atingos ilin. Do, gvidantoj de junularaj

grupoj, landaj sekcioj de TEJO, ĉiu kiu konas junulojn en la Movado, bonvolu diskonigi ĉi tiun oferton kaj varbi novajn junajn membrojn por 1980! Ĉu ankoraŭ necesas diri, kien sendi la kotizojn? Se vi neniel trovas la adreson kaj kontonumeron de nia kotzperanto en via lando, vi ĉiam rajtas uzi la adreson de UEA mem. Do, pli juna movado portu la lingvon tra ĝia centjara datreveno en la novan jarcenton!

Stefan MacGill



ĈI TIU rustika titolo servas kiel aparte taŭga emblemo de la venontjara Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Finnlando. Ĉu ne, ke la emblemo perfekte akordiĝas kun la anoncita ĉeftemo de la 36a IJK — "Popola tradicio en la nuntempa mondo"? Cetere, ĝi — la emblemo ankoraŭ — sen grafikaj mistifikoj bele simbolas ankaŭ la urbon de la IJK. En la Unua Bulteno de la Kongreso oni enkonduke legas jenon:

"Trans la Balta Maro, trans arkipelago unika en Eŭropo, situas la sudokcidenta Finnlando. Verŝajne vi venos per ŝipo. Plej unue vi rimarkos la krientajn mevojn; vi vidas nudan, grizan rokinsuleton — vi alvenis al Finnlando. Iom post iom la rokoj iĝas pli grandaj, multiĝas, fariĝas verda insularo. Poste, dum aŭtobusa veturo el Turku al Rauma, vi vidas alian parton de la varia pejzaĝo de Finnlando: la plej malnovan kulturregionon de la lando.

Rauma (prononcu: 'raŭma'), la loko de la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, estas urbeto kun ĉirkaŭ 30 000 loĝantoj. Ĝi zorge kulturas siajn tradiciojn: la renomon de marista urbo, la malnovan centron kun ligna domaro, la interesan dialekton (naskintan eĉ iom da propra literaturo) kaj la tradicion de puntofarado." Kaj tiel plu! Ĉio dozita per grandaj kvantoj da simpleco kaj klaro. Ni ne povas ĉi tie represi la tutan bultenon, sed vi ja povas peti kaj ĝin kaj la aliĝilon ĉe la adreso: **36a IJK, Anundilankatu 3, SF-26100 Rauma 10, Finnlando**. Pri la kotizoj rerigardu nian oktobran numeron, p. 175.

Afriko

- *Kwa kulinda tamaduni za Afrika* (Por la defendo de afrika kulturo) nomiĝas la ĵus aperinta, grandformata, 12-paĝa broŝuro pri lingvoproblemo kaj kultura imperiismo. Ĉi tiun svahillingvan broŝuron eldonis UEA/TEJO, ĉefe por senpaga distribuo en Afriko. La monrimedojn disponigis parte Nederlanda Esperanto-Asocio, kaj parte la Fondaĵo Azio-Afriko. Ĝi estas acetebila ĉe la Libro servo de UEA kontraŭ 5,10 gld.

Britio

- Kampanjo por Nuklea Malarmado (Campaign for Nuclear Disarmament), fondita i.a. de la fama filozofo Bertrand Russel, en sia konferenco inter la 16a kaj 18a de novembro en Londono, voĉdonis pri dokumento, laŭ kiu tiu socia movado en Britio "favoras la instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj". 85 konferencanoj voĉdonis por, kaj 39 kontraŭ.

Brazilo

- Bela kaj utila modo ekregas la Movadon dum la lastaj jaroj: ĉiu klopodas proprieti sidejon. Lastatempe tion sukcesis atingi Brazila Konsilantaro de Esperanto, kiu la 24an de oktobro ĉi-jare acetis ĉambron en granda konstruaĵo de la ĉefurbo Brazilio. La Konsilantaro mem fondiĝis nur antaŭ kvin jaroj, por ponti la tiamajn malfacilaĵojn en la interrilatoj de la du aliaj landaj E-organizaĵoj — Brazila E-Ligo kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj — ambaŭ bazitaj en Rio-de-Janeiro. La Konsilantaro planas disponigi sian novan sidejon ankaŭ al la LKK de la 66a UK en Brazilio en 1981.

Belgio

- Komence de novembro, *Tintin*, ilustrita semajna revuo franclingva, aperigis 7-paĝan artikolon pri Esperanto. Unu el la verkintoj de la artikolo, Germain Pirlot, proponis teston fine de la artikolo. Venis kelkcento da reagoj, kaj la plimulto de la skribintoj petis pliajn informojn pri la Internacia Lingvo. La sama artikolo aperis ankaŭ en al nederlandlingva eldono de la revuo, *Kuifje*, kio rezultigis multajn dekojn da informpetoj.

Koreo

- Komence de oktobro 24 junaj geesperantistoj partoprenis 3-tagan aranĝon ĉe la pitoreska monto Dobong. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj sekvis superan kurson de Esperanto. Meze de julio, ĉe la monto Sorak, okazis alia gejunula renkontiĝo, tutsemajna, kiun partoprenis 15 junaj geesperantistoj.

Venezuelo

- La 6an de novembro reprezentantoj de la venezuela Esperanto-movado renkontiĝis kun tri funkciuloj de la registaro, por trakti la kunlaboron de la Movado en kelkaj registaraj projektoj kaj la rolon de la koncernaj registaraj

instancoj en la agado de esperantistoj. Reprezentiĝis la registaraj fakoj pri: interamerikaj organizaĵoj, mondaj organizaĵoj kaj duflanka kunlaboro.

Ĉeĥoslovakio

- Pli ol 80 personoj partoprenis inter la 5a kaj 8a de oktobro en Mělník "konsultiĝon de la ĉefaj funkciuloj" de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La kunveno, kiu fakte havis trajtojn de seminario, traktis i.a. jenajn temojn: kultura politiko de la ŝtato, "ideologiaj bataloj" en la Esperanto-movado, strukturo kaj taskoj de ĈEA, regularo por lokaj grupoj, rilatoj kun internaciaj E-organizaĵoj, nova Statuto de UEA, laborplano de ĈEA por 1980. Parton de la kunveno ĉeestis ankaŭ Libuše Vaňková, reprezentantino de la Ministerio pri Kulturo (ĉeestinta ankaŭ la pasintjara UK en Varno).

Fake

Konkursoj

- Al la sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA venis ĉ. dek manuskriptoj por la "Premio Raymond Schwartz" (ĉ. 4 300 gld.), kiu celas stimuli la verkadon de romanoj en la Internacia Lingvo. Aparta juĝkomisiono, konsistanta el Emilija Lapenna (Jugoslavio), Nicolino Rossi (Italio) kaj Hugh Martin (skoto loĝanta en Islando), verŝajne finos sian laboron tiel, ke estos eble anonci la rezultojn en la 65a UK en Stokholmo.

Volontula Servo

- En decembro unuafoje eklaboris en la Centra Oficejo de UEA nederlanda militrifuzanto. Laŭ la nederlandaj leĝoj, junuloj, kiuj pro principaj motivoj rifuzas la devigan soldatservon, devas anstataŭe servi ĉe socie utila institucio. Lastatempe la koncerna ministerio rekonis ankaŭ UEA tiusence. La unua "volontulo" akceptita ĉe UEA laŭ tiu leĝo estas Huibert den Draak, diplomita fotografisto, kiu plenumos ĉefe grafikajn laborojn.

Periodaĵoj

- Plaĉa kiel ĉiam estas la ĉi-jara kajero de *Sennacieca revuo*. Ĝi ente-

nas i.a. artikolojn pri la juna Schiller kaj pri "Esperanto kaj literaturo"; la lasta inkluzivas konsilojn al verkemuloj. Ne mankas ankaŭ en tiu revuo kontribuaĵo de Bernard Golden — "La signifo de la arto de la prahistoria homo".

Libroj

- La Fremdlingva Eldonejo de Pekino lastatempe aperigis kvin samformatajn libretojn, kiuj traktas kelkajn elstarajn eventojn en la historio de Ĉinio de la 19a kaj 20a jarcentoj. Ili estas kompilitaj de membroj de la fakultatoj pri historio en la Universitato de Fudan kaj la Pedagogia Universitato de Ŝanhajo. Temas pri *La Opia Milito* (de 1840-42), *La revolucio de la Tajpinga Ĉiela Regno* (1851-64), *La reforma movado de 1898*, *Jihetuan-movado* (pri la t.n. Boksista Ribelo de 1900) kaj *La Revolucio de 1911*.

Informado

- D-rino Marjorie Boulton verkis artikolon pri la traduko de *Epifanio* de Ŝekspiro (trad. W. Auld), kun mencio de *Erevono* de S. Butler (trad. A. Venture) por la tre prestiĝa periodaĵo *Notes and Queries* (Notoj kaj demandoj), kiu distribuiĝas tutmonde al ĉiuj universitatoj uzantaj

la anglan lingvon. La artikolo, aperinta antaŭ nelonge, estas valora atentigo pri Esperanto en la plej altaj rondoj de erudiciuloj.

Persone

Jung

- Teo Jung, honora membro de Uea, festos la 20an de decembro ĉi-jare la 70an datrevenon de sia serioza ekinteresiĝo pri la Internacia Lingvo al kiu li dediĉis sian tutan vivon.

Jung, kiu la postan tagon (la 21an de decembro) fariĝos 87-jara, ankorau viglas kaj aktivas. Ĉi-jare aperis lia aŭtobiografia, 400-paĝa verko *Ĉiu ĉiun*, kiun li mem venis aŭtografi dum la 64a UK en Lucerno.


Van Heugten

- La nederlandano W.A.M. van Heugten faris antaŭ nelonge du-semajnan prelegvojaĝon tra Francio, de Lille ĝis Perpignan. Liaj temoj estis "Ĉu vi konas Nederlandon?" kaj "Strigospegulo en Eŭropo". Li finis sian vojaĝon per prelego en Luksemburgo. En marto 1979 li

prelegis pri la samaj temoj en Danlando kaj Svedio.

Ciccanti

- Pastro Albino Ciccanti el Italio, fine de septembro kaj komence de oktobro ĉi-jare, faris plian prelegvojaĝon (v. ankaŭ nian numeron de julio/aŭgusto, p. 122). Temis ĉi-foje pri Danlando, kie li faris 13 prelegojn, intervjuiĝis en radio kaj pluraj ĵurnaloj, kuncelebris meson en Esperanto kaj starigis plurajn utilajn kontaktojn kun lernejoj kaj ekleziaj instancoj. Kiel kutime, ĉiuj prelegoj okazis en Esperanto.



SEMAJNO mortis, vivu

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet/STAFETO
Ĉefredaktoro: Stefan Maul

40 paĝoj DIN A4 - riĉe ilustrita
11 kajeroj jare - jara abono:
49,50 gmk aŭ 800,- b.fr.

Ekde januaro 1980 aperas ĉi tiu revuo kun multaj interesaj artikoloj el ĉiuj kampoj de moderna vivo: politiko, ekonomio, kulturo, scienco, tekniko, modo, kuirarto, sporto, turismo kaj multaj aliaj. Kun apartaj paĝoj por infanoj kaj junularo, kun distraĵoj, noveloj, satiroj, enigmoj kaj konkursoj.

Propraj kunlaborantoj en pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj.

MONATO estas la revuo por esperantistoj de ĉiu aĝo, ĉiu medio, ĉiu lando. Tuj abonu!



Al eldonejo TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio

poŝtĉekkonto 000-0422856-33

Jes, ankaŭ mi volas legi la revuon MONATO.

Mi abonas por 1 jaro ☐

Mi petas pliajn informojn ☐

Nomo: _____

Adreso: _____

Skribu maŝine aŭ preslitere

SVISA ĈEFDELEGITO HAVAS NOVAN ADRESON

La ĉefdelegito/kotizperanto de UEA por Svislando, anoncita en niaj numeroj de oktobro kaj novembro, havas novan adreson: s-ino Florence Cool-Côté, CH-6084 Hasliberg-Waserwendi. La poŝtekkonto de la ĉefdelegito estas 34-4928.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: C. J. Knoop.

SOCIETO ZAMENHOF 1979

BRAZ: 225 Elmo Pereira Nunes.
JAP: 226 A.C. Blatt. US: 227 G. Novak; 228 Doris H. Vallon-Wheeler.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

BRIT: 1 John Brownlee. ITAL: 2 Ranieri Clerici. FRG: 3 M. von Waldowski; 4 W. von Waldowski. JUG: 5 Emilija Lapenna. NED: 6 Ingeborg M.J. Dijkhoff-Lenze. NORV: 7 Agneta Anjer; 8 Ludwig Anjer; 9 Pepita de Caspary.

PATRONOJ DE TEJO

27 O. Pereira da Silva, Brazilo. 28 Andrée Orsolini, Belgio.

NOTO: La ĉi-numera manko de la donacolistoj feliĉe ne signifas, ke la membroj ĉesis subteni la Asocion. La listo aperos en la januara numero.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 30

(pri la demando vidu nian numeron de novembro)

A. Fraŭlino Snob, kune kun Maria Fromaĝi, sinjoro Kovaloj kaj Karolo, la aŭtomobilisto, veturas tra la urbo Romo de la periodo de Nerono, serĉante vidindaĵojn priskribitajn en Baedeker-a gvidlibro de la 20a jc. La pola verkisto kaj filmisto Jean Forge (pseŭdonimo de Jan Fethke) estas la aŭtoro de la sciencfikcia romano *Saltego trans jarmilojn*.

B. La misaventuroj sur la stratoj de Parizo de Anni Laufer, erarinta germanino, estas rakontitaj de Raymond Schwartz, franca humoristo, poeto kaj prozisto, en la romano *Anni kaj Montmartre*.

C. Vitalij, rusa inĝeniero okupiganta pri la konstruo de metroo en Moskvo, iras al Berlino por studi ties metron. La citita priskribo de la germana ĉefurbo venas el la romano *Metropolitenoj* verkita de la rusa Esperanta verkisto V. Varankin.

Ĉ. La brita maroficiro Gulivero savas sin post ŝippereo, alboridigante en Kazohinio. De la marbordo de tiu imagita insulo du hinoj veturigas lin en aŭtomobilo al la ĉefurbo. La aŭtoro de la soci-kritika romano *Vojago al Kazohinio* estas la hungara inĝeniero Sándor Szathmári.

D. Pierre Bouchardelle (kaŝnomo de Pierre Touchard), dum la dua mondmilito, iras al la sudfranca urbo Marsejlo (Marseille), kie li partoprenas en subgrunda patriota agado. Li rolas en la romano *Kiel akvo de l'rivero* de Raymond Schwartz.

DEMANDO 31

(la respondo aperos en nia januara numero)

La jaro 1979 estas la Internacia Jaro de la Infano, do estas konvene prezenti en tiu ĉi rubriko demandon pri la kultura kaj socia rolo de Esperanto rilate al infanoj.

a. En 1844 d-ro Heinrich Hoffmann el Frankfurto ĉe Majno verkis libron por sia fileto Carl kaj li mem ilustris ĝin per komikaj bildoj. Post publikigo en 1845 ĝi fariĝis klasikaĵo de la infanliteraturo kaj estis dufoje eldonita en Esperanto. Kiel ĝi nomiĝas kaj kiu tradukis ĝin?

b. Kiu organo servas kiel ligilo por organizaĵo, kies celo estas disvastigi skoltajn idealojn per Esperanto kaj disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj?

c. Kiun tradukon de mondfamaj infanfabeloj faris d-ro L.L. Zamenhof inter la jaroj 1888 kaj 1914?

ĉ. Gepatroj, kiuj serĉas vortojn en Esperanto por infanludoj povas turni sin al kiu fakterminaro?

d. Kiu romano verkita de Nobel-premiito rakontas la aventurojn en Afriko de du infanoj, dekkvarjara pola knabo kaj okjara angla knabino? Kiu tradukis ĝin en Esperanton?

e. Kiu Esperanto-organizaĵo havas kiel celojn 1) kulturajn interŝanĝojn inter gelernantoj, 2) kontribuadon de infanoj al interpopola kunlaboro kaj 3) instruadon de la Internacia Lingvo en lernejoj?

f. Kiu romano por infanoj (kaj ankaŭ "maljunaj infanoj"), verkita de mondfama hungara teatra verkisto de la 20a jarcento, temas pri grupo de budapeŝtaj knaboj, kiuj organizis "maŝtiko-klubon"? Kiu esperantigis ĝin?

g. Kiuj estas la "geonkloj esperantistaj" kaj kiel ili helpas siajn junajn "genevojn"?

ĝ. Alia klasikaĵo de la infanliteraturo tradukita en plurajn lingvojn kaj ankaŭ en Esperanton havas kiel ĉefrolanton urseton, kiu donas sian nomon al la titolo de la verko. Kiuj estas la aŭtoro kaj la kuntradukintoj?

h. Kiu internacia Esperanto-revuo nuntempe eldonata de Hungara Esperanto-Asocio eĉas dediĉita al infanoj, kiuj komencas lerni Esperanton?

*Antaŭdankon
por la frua pago
de via kotizo
por la jaro 1980*

Nekrologoj

VITTORIO DALL'ACQUA (1934-1979), konata aktivulo en Milano kaj konsilanto de Itala Esperanto-Federacio, mortis en aŭgusto, postlasante manuskripton de ampleksa Esperanto-itala vortaro. Li verkis du satirajn teatraĵojn, *Senĉenaj dialogoj* (1973) kaj *Senkatenaj dialogoj* (1974), kaj la lernolibron *Esperanto; Rivoluzione della parola* (1977).

JAN VAN DOOREN (1917-1979), brajlskribisto, delegito de Weert (Nederlando), Dumviva Membro de UEA, mortis antaŭ nelonge.

JAMES LLOYD FORD (1915-1979), ekde 1957 fakdelegito pri konstruado kaj SOS-aŭtoservo en Walton-on-Thames (Britio), forpasis en septembro.

CORNELIA MARIA VAN KLEEF (1934-1979), doktorino kaj fakdelegito pri nederlanda literaturo, kiu dum multaj jaroj subtenis energie Esperanton kaj la laboron por homaj rajtoj, forpasis en oktobro.

ILMARI RAUTIO (1892-1979), esperantisto de sia frua junaĝo, fakdelegito pri ŝako en Helsinko, forpasis frue en ĉi tiu jaro.



FREDERIKO RASOANAIVO (1904-1979) mortis la 14an de julio en Antananarivo. Li estis movada pioniro en Madagaskaro, verkis la unuan lernilon — *Fianarana Esperanto* (1975) —, redaktis revuon, 35 jarojn anis en UEA.

HERMAN NOPONEN (1893-1979), multjara instruanto de la Internacia Lingvo, delegito de Tampere (Finnlando) de 1945 ĝis 1976, mortis la 18an de septembro.

HEINRICH NÄGELI (1913-1979), kiu servis de 1939 ĝis 1974 kiel delegito de Winterthur (Svislando) kaj fakdelegito pri komerco, forpasis en septembro ĉi-jare.

Artistoj pri pentroarto, skulptoarto, artgrafiko, desegnoarto, artfotografio, ceramikarto kaj la aliaj, profesiaj, amatoraj kaj la subtenantaj, kontaktu al: Universala Artista Ligo de Esperantistoj, PL 24, SF-41161 Tikkakoski, Finnlando.

Ĉikago invitas bildkartojn por ekspozicio en la Urbodomo dum la Semajno de Internacia Amikeco, februaro 1980. Ĉiu (kiu skribas sufiĉe klare!) ricevos nian Kalendaron de I.A., 1887 — 2059. Janet Bixby, Prez., Esperanto-Societo de Ĉikago, Box 11958, Chicago, IL 60611, Usono.

La viro en la mortotuko de episkopo S. Danell (trad. I. Lagerström), traktas novajn sciencajn faktojn pri la mortotuko el Torino, plej kredeble tiu tuko en kiu la korpo de Jesuo estis envolvita. 78p., SKr 25,00, je antaŭpago afrankite. Eldonejo Verda Stelo, Landerigatan 7, S-416 70 Göteborg, Svedio. Poŝtĉekkonto: 8 84 51-0.

Gestudentoj deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Adreso: Universitato CEUB, Esperanto-Kurso, EQN-707/907, BR-70740 Brasília (DF), Brazilo.

Bajuvaraj esperantistoj, kunstampu Bajuvaran Agadon, sidejo Salzburg. Josef Hell, Feichten 1, D-8223 Oberfeldkirchen, FR Germanio.

Unua libro por Poloj (1887) interŝanĝebla kontraŭ Unua Libro por Rusoj (1887) aŭ Angloj (1888). Skribu al SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

Studentaj junuloj liceaj deziras korespondi kun gesamideanoj pri ĉiuj temoj. Tommasi Nicola, ĉe Instituto "Giberti", Via Bacilieri 1, I-37139 Verona, Italujo.

Naturistoj/nudistoj! INOE invitas vin: aliĝu, legu nian gazeton, renkontiĝu venontjare sur naturista tereno! Informojn kaj aliĝilon petu de H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, F.R. Germanio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 gld. (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem.

Instruistoj bezonataj por scienco kaj tekniko. Mi komencas organizi korespondan kursaron, por kiu la studentoj (15–25-jaraj) pagos. Interesitoj sendu skizojn de proponitaj kursoj. Mi kunordigos la proponojn kaj respondos kun specifaj petoj. Ing. R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501, Chicago, IL 60657, Usono.

Por ŝia novkolekto bonvolu sendi bildkarton pri magistrata domo al mia fratino, kvarbuba patrino: Jakobino Helderman, Frederik Hendrikslaan 34, 2712 EE Zoetermeer, Nederlando. Koran dankon! Marjo van Bentum.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio aŭ Greklando, skribu frue al la CO de UEA, por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Informiĝu objektive pri la optimale modernigita ortografio de Esperanto! — OEO, 24 avenue Riedenheim, F-68100 Mulhouse, Francio.

Kio estas la kurzo por la Stelo? La respondon vi trovos en la Bulteno de Universala Ligo.

Ĉu ĉiuj viaj junaj gekonatoj scias pri "Kontakto", pri la Pasporta Servo kaj pri la Internacia Junulara Kongreso de TEJO? Tio estas niaj konvinkiloj. Ĉu vi ne povus utiligi ilin por konvinki gejunulojn, ke membreco en TEJO estas ambaŭflanke profitiga?



kontakto

Indekso

revuo *Esperanto*,

72a jarkolekto,

numeroj 877-888



Åberg, L. 2, 122
 Adamson, H. 8
 Administrado 105
 Ády, E. 49
 Afriko 128, 154, 214
 Akademio 137, 182
 Aleksiev, N. 119
 Almeida, A.S. 133
 Amorim, N.D. d' 78
 Anev, A. 157
 Angelova, M. 197
 Argentino 102
 Atanasov, A.D. 189
 Auld, W. 30, 182, 192, 206
 Aŭstralio 35, 137
 Bagger, P.V. 101
 Baghy, J. 89
 Bardini, M. 196
 Baur, A. 66
 Beaucaire, L. 30
 Béguin, D. 156
 Belartaj Konkursoj 138, 153, 166, 170, 188, 214
 Beleva, B. 157
 Belgio 105, 155, 161, 214
 Bellefeuille, Y. 176
 Benczik 10, 30, 31, 36, 151
 Bernard, R. 122, 182, 190
 Bertin, Ch. 152
 Bibliografio 7, 12, 32, 51, 75, 92, 134, 173, 193, 210, 212
 Bibliotekoj 56
 Blanke, D. 27, 43, 90, 138, 152
 Blinduloj 35, 128, 185
 Bociort, I. 29
 Bormann, W. 89
 Boulton, M. 89, 119, 214
 Brazilo 84-86, 102, 214
 Brennan, A. 9, 13
 Britio 16, 35, 108, 197, 214
 Bulgario 17, 118, 138, 197
 Butler, S. 133
 Camus, A. 191
 Carlevaro, T. 70
 Casey, A. 157
 CED 43, 114, 152
 Centra Oficejo de UEA 105, 109, 139, 161, 205, 214
 Chapman, H.S. 192
 Chaves, S. 86
 Childs-Mee, A. 35
 Ciccanti, A. 122, 215
 Conterno, C. 90, 172, 211
 Cool, J.F. 49, 192

Corsetti, R. 191
 Cseh, A. 65
 Cushing, J. 4
 Ĉeĥoslovakio 57, 76, 168, 214
 Ĉilio 16, 76, 102, 148
 Ĉinio 4, 16, 23, 77, 95, 137, 181, 214
 Dahl, E. 35
 Dall'Acqua, V. 217
 Dam, D. 186
 Damjanov, V. 156
 Danlando 77, 101, 215
 Daŝgupto, P. 57, 130
 Delegita reto 34, 106
 Diplomatio 142
 Dobre, M. 185
 Dominte, C. 191
 Dooren, J.v. 217
 Dorno, F.V. (pseŭd.) 30
 Dresen, H. 8, 11, 197
 Du Bois-De Zeeuw, A. 97
 Duc Goninaz, M. 7, 30, 90
 Durrant, E.D. 201-204
 Edukado 45, 112
 Egiptio 56
 Eichholz, R. 57
 Ekspozicioj 16, 70, 96, 118
 Eksteraj rilatoj de UEA 17, 21, 83, 110, 121
 Ekvadoro 182
 Ekzameno E 18, 38, 59, 79, 98, 139, 198, 216
 Eldonaĵoj:
 Apontamentos de Esperanto 133
 Brand 91
 El la "Verda Biblio" 132
 El popola Ĉinio 4
 Enkonduko al ekumenaj problemoj 91
 Enkonduko en la teorion biologion 191
 En maskobalo 89
 Erevono 133
 Eseo tra la kamparo 192
 Esperanto 107
 Esperanto and international language problems 210
 Esperanto-dokumentoj 114
 Esperanto: lingvo, movado... 90
 Esperantologiaj kajeroj 1 50
 Esperanto-makedona vortaro 132
 Esperanto sen antaŭjuĝoj 51
 Estonia soveta poezio 11
 Europäische Hochsprache... 173
 Facetoj de Esperanto 30
 Filoj de l' ŝtonkora homo 31
 Fondita sur roko 91

Général et l'Antibabel, Le 16
Ĝardeno de la urbestro, La 90
Ĝis nun 10
Heroldo de Esperanto 17
Infanoj en la mondo 211
Jes, Esperanto estas vera lingvo 50
Justuloj, La 191
Knaboj de Paŭlo-strato, La 132
Konstitucio por tera federigo 89
Kontakto 113
Krucenigmoj kaj...humuro... 31
Leo Tolstoj... 210
Libro de la amo, La 10
Lingvistikaj aspektoj de Eo 209
Lingvogvidilo E-hindia 191
LPLP 148
Marvirina luno 211
Morto de la ĉielarko, La 49
Noktoj 31
Nova butikisto de Nukugaia, La 131
Nuntempa ĉelkariologio kaj citotaksonomio, La 191
Optimala ortografio 12
Praktika bildvortaro de Esperanto 129
Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro 190
Santos Vega 11
Satiroj 30
Sciencaj komunikaĵoj 50
Semajno 22
Sennacieca revuo 214
Sesdekoka – ĉu decida jaro, La 31
Skota antologio 172
Socia romano en Esperanto, La 10
Sonrevuo 44
Trezorinsulo 30
Turoj de l' ĉefurbo, La 130
Urbo de terura nokto, La 192
Vage tra la dimensioj 49
Vorto kaj vortelemo en Eo 50
Esperantologio 43, 152, 187, 209
Estrara Raporto 105-117
Eŭropa E-Centro 26, 108
Eŭropa Federalista Partio 95
Eŭropa Komunumo 26, 66
Evolulandoj 88, 95, 121, 128
Faka agado 17, 36, 44, 56, 86, 96, 101, 114, 119, 123, 135, 155, 185, 187, 197
Faka literaturo 50, 52, 88, 182
Fantom, I. 52
Faulhaber, F. 78

5,5 procentoj de la membraro de UEA estas malpli ol 25-jara, 0,4 estas malpli ol 18-jara. Jen du procentaĵoj, kiuj postulas nian atenton en la nova jardeko. Helpu altigi ilin. Rekomendu la servojn de TEJO al la gejunuloj en via loko, regiono ...





Kun bondeziroj por la Nova Jaro . . .

Kun bondeziroj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco . . .

UNICEF (Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por la Infanaro) ĵus publikigis por UEA bondezirajn kartojn kun la supraj desegnaĵoj (en plurkolora preso) kaj tekstoj. UEA vendas la kartojn profite al UNICEF kaj ne donas do rabaton. Dek kartoj (minimuma mendo) kostas 11,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA.

Filatelio 17, 39
Filmo 155
Filologoj 119
Financo 25, 55, 103, 106, 115-117, 121
Finnlando 36, 56, 123, 213
Follereau, R. 10
Ford, J.L. 217
Forster, P.G. 210
Francini, W. 51
Francio 7, 16, 56, 138, 215
Francis, J. 159
Frank, H. 152
Gabrielli, L. 10, 56, 90
Gacond, C. 152
Galeski, M. 132
Germanio, DR 16
Germanio, FR 16, 17, 34, 76, 118
Geus, F. de 184
Gibczyńska, J. 157
Giorgi, A. de' 188, 197
Glarner, R. 148
Glazunov, V.A. 153
Golden, B. 3, 88, 135, 153, 190, 207 (v. ankaŭ Ekzameno E)
Goodheir, A. 17, 91, 137, 153, 171, 182
Grafika Centro de UEA 105, 161
Grattapaglia, U. 205
Gregor, D.B. 133
Greklando 76
Greutert, K. 141, 160
Gut, W. 141
Ĝivoje, M. 44, 152
Ĝuĝev, S. 182
Haddon, R. 34
Hajpin, L. 192
Hamann, J. 61
Harry, R. 137
Haszpra, O. 26, 50
Haugen, E.A. 91
Haupenthal, R. 182
Heide, Z. 153
Heugten, W.A.M. van 77, 215
Hill, D. 156

Hinda Unio 161
Hispanio 76, 109, 197
Historio 3, 70, 163, 201, 206, 207
Høeg, T.A. 151
Homaj rajtoj 34
Honoraj membroj 105, 149
Hungario 17, 21, 41, 43, 96, 101, 108, 138, 161, 205
Ibsen, H. 91
IFEF 77, 123
Ikso (pseŭdonimo) 23
ILEI 36, 187
Infankongreseto 142, 154
Infano, Internacia Jaro de la 2, 36
Informado 16, 17, 35, 76, 77, 96, 108, 118, 119, 137, 138, 162, 181, 182, 196, 197, 202, 214
Inoue, H. 162
Institucio Hodler '68 103, 107
Instruado 7, 21, 41, 56, 77, 101, 168, 182, 202
Interlingvistiko 16, 17, 43, 70, 135, 163, 209
Internacia Somera Universitato 151
Irano 95, 108, 137, 202
Isaev, M. 82, 152
Islando 109, 157
Isobe, Y. 16, 36
Italio 56, 77, 94, 96, 118, 138, 196
Jackson, I. 34, 55, 136, 158
Janton, P. 56
Japanio 119, 162
Jeneckov, D. 137
Jensie, M. 97
Jermář, J. 57
Jókai, M. 31
Jordan, D.K. 31

Jugoslavio 4, 44, 55, 77, 95, 138, 184

Jung, T. 215

Kalendaro de eventoj 53, 190

Kalocsay, K. 8

Kanado 7, 76, 95

Kantonen, L. 2

Kat, J.O. de 151

Kawasaki, N. 50

Kehlet, E. 211

Kirkwood, G. 30

Kleef, C.M. v. 217

Kobelt, W. 191

Kolker, B. 12, 51, 151, 163

Komerco 17, 57

Kongresoj:

UK 63a, Varno 108, 148

UK 64a, Lucerno 14, 33, 93, 141 – 157, 160

UK 65a, Stokholmo 148, 174, 186

UK 66a, Brazilio 84

IJK 34a, Veliko Tarnovo 113

IJK 35a, Austerlitz 13, 94, 158, 159, 160, 194

IJK 36a, Rauma 175, 213

Kongresoj aliaj:

Belga 36

Blindula 185

Fervojista 123

Franca 36

Katolika 96

Nederlanda 95

Konisi, G. 49

Konstantinova, R. 153

Kordylewski, L. 124, 191

Koreo 137, 214

Kostariko 137

Kotizoj 25, 178, 213

Krikke, W. 91, 132

Kubo 142

Kulturo 111

Kurisu, K. 162

Kursoj 35, 56, 76, 95, 182, 197

Kursoj korespondaj 7, 103

Labortendaroj 194

Landa agado 4, 16, 44, 56, 61, 81, 85, 101, 113, 122, 162, 163, 182, 185, 196, 197, 202

Lapenna, E. 149

Lapenna, I. 61, 64, 119, 201 – 204

Lebrun, V. 196, 210

Lejzerowicz, I. 132

Le Puil, J. 119

Lernejoj 41, 77

Lernolibroj 88, 133

Leteroj de legantoj 28, 52

Lasu al iu juna homo ŝteli vian propran ekzemplaron de "Kontakto". Se vi ne havas ĝin, abonu ĝin tiucele. Kuraĝigu gejunulojn membriĝi en TEJO. La Movado, kiu rigardas al la estonteco, devus paŝi pli juna en la novan jardekon!



kontakto

Lewin, R.A. 151
 Libroj 88, 155
 Lienhardt, A. 12
 Lingvo 122, 189, 207
 Lingvo-problemo 1, 26, 66, 87, 137, 143, 148
 Lins, U. 31, 152, 201
 Lins de Albuquerque, J. 36
 Lister, D. 10
 Literaturo 8, 170, 188
 Llecht-Walter, R. 56
 Lo Jacomo, F. 152
 Luchsinger, M. 141
 Luettig, F. 35
 Luez, D. 168
 Luksemburgo 96
 MacGill, S. 153, 213
 Maertens, G. 205
 Malto 44, 187
 Marček, S. 31
 Marković, S. 31
 Masterman, D. 157
 Maul, S. 22
 M' Bow, A-M. 21
 Medicinistoj 36
 Membro-statistiko 58, 106
 Mészáros, B. 191
 Milojević, S. 82, 156, 161, 181
 Miltenburg, W.J.C. van 66
 Miziošek, W. 91
 Molnár, F. 132
 Morocz, I. 57
 Movado 1, 4, 23, 163, 165, 176, 206
 Muller, R. 45, 142, 143
 Nägeli, H. 217
 Nedelčeva, N. 153
 Nederlando 95, 118, 135, 138, 158
 Neergaard, P. 119, 182
 Nervi, M. 130, 153, 156
 Neŭtraleco 61, 149, 165
 Nikolov, Z. 141, 144, 147, 150, 160
Nogueira, R.P. 133
Noponen, H. 217
Norvegio 56, 136, 196
Novak, J. 119
Numismatiko 137
 Obligado, R. 11
 Oficiala informilo 18, 37, 58, 78, 97, 120, 139, 177, 198, 216
 Ojalo, J. 8
 Olivan Hernando, S. 78
 Oljanov, V. 139
 Organizo de Amerikaj Ŝtatoj 83, 110
 Ošap, J. 141, 146, 153
 Pakistano 56
 Parlamenta agado 66, 76, 101, 118
 Peeraerts, P. 161
 Peevski, V. 197
 Pennacchietti, F. 137
 Periodaĵoj v. Eldonaĵoj
 Peruo 102, 197
 Pettyn, A. 103
 Pilger, W.F. 211
 Piron, C. 36, 57, 87, 137
 Plehn, H.J. 151

Pollando 103, 136, 137
 Pomfret, J. 211
 Pop-Atanasov, G. 132
 Portugalio 118, 148
 Poŝtmark-kolektado 106
 Potts, Bertram 131
 Pra-Esperanto 3
 Prelegvojaĝoj 17, 36, 56, 77, 110, 118, 119, 215
 Premioj 57, 96, 197
 Prodanov, P. 156
 Pupteatro 57, 184, 196
 Radio 16, 20, 57, 77, 100, 109, 138, 139, 181, 200
 Radioamatoroj 25
 Rados, P. 10
 Ragnarsson, B. 11, 49, 96, 137, 170
 Rasoanaivo, F. 217
 Rautio, I. 217
 Ré, H. 11
 Recenzoj: v. Eldonaĵoj
 Reprodukto 124 – 127
 Rezolucioj 146, 201
 Ritterspach, G. 123
 Rogov, A. 35
 Rossetti, R. 8
 Rotarianoj 138
 Rublov, S.G. 196
 Rumanio 185
 Sadler, V. 149, 205
 Saheb-Zamani, Ĵ.A. 202
 Saheb-Zamani, M.H. 202
 Salnikov, J.T. 97
 Samodaj, V.V. 210
 Schleicher, Ib 101
 Schönrich, K. 137
 Schubert, K. 91
 Schulz, R. 10, 173
 Schwerin, P.E. 35
 Scienco 45, 124 – 127
 Scolnik, R. 97
 Sekelj, T. 96
 Semajno de Internacia Amikeco 9
 Seppik, H. 8
 Shinoda, H. 149
 Silber, G. (pseŭd.) 31
 Sindikatoj 17, 197
 Sire, S. 31
 Sirio 95
 Skaljer-Race, V. 153
 Smet, W.M.A. de 152
 Smit, W.M. 153
 Solzbacher, W. 91
 Someraĵ Universitataj Kursoj 36
 Somlai, L. 132
 Soveta Unio 35, 61, 81 – 84, 163, 197
 Sporto 63, 138
 Srilanko 56
 Starr, M. 17, 96
 Staszczak, B. 61
 Statuto 61, 64, 105, 149
 Stefanović, V. 157
 Stevenson, R.L. 30
 Støp-Bowitz, C. 102, 118, 151, 205

Su, Armand 77
 Sud-Ameriko 102
 Svedio 17, 108, 122, 186
 Svislando 16, 66 – 74, 95, 141, 154, 156, 197
 Sygnarski, M. 196
 Szabó-Felső, F. 151, 205
 Szerdahelyi, I. 41, 50, 96, 101, 209
 Ŝariatmadari, Ajatula 202
 Tajlando 36
 Tammelo, I. 173
 Teatro 112, 157
 TEJO 13, 34, 55, 77, 94, 112, 113, 136, 158, 159, 176, 194, 213
 Televido 35, 57, 109, 196
 Thomson, J. 192
 Tófalvi, É. 153
 Tolstoj, L.N. 28, 210
 Tonkin, H. 1, 17, 48, 64, 137, 141, 142, 149, 160, 165, 210
 Tonkin, J. 72
 Toteva-Kostova, G. 156
 Tradukoj 17, 35, 188
 Transporto 96
 Tucker, A.G. 35
 Tuinder, J. 128
 Turin, G. 97
 Turismo 56, 66, 72, 154
 Turkio 56
 Tvarožek, E.V. 131
 Tzaut, O. 157
 UEA:
 Estraro 22, 148, 205
 Komitato 102, 148, 149
 Ullman, P. 11
 UN 2, 45, 102, 110, 143, 165, 211
 Unesko 17, 21, 87, 110, 121, 165, 201 – 204
 Universitatoj 7, 16, 41, 56, 76, 101, 182, 202
 Urugvajo 76, 201
 Usono 56, 102, 137, 205
 Varbado 136
 Varga-Haszonits, Zs. 101
 Vatré, H. 10
 Velebit, J. 132
 Venezuelo 102, 118, 214
 Venlo Fon 137
 Venture, A. 133
 Vetter, R. 50
 Vjetnamio 197
 Vogel, G. 196
 Volapuko 135
 Volontula Servo 105, 214
 Vortaroj 133
 Vulliamy, L. 153
 Waringhien, G. 129, 182
 Wells, J.C. 209
 Wiener, L. 3
 Wood, R.E. 7
 Wüster, E. 27
 Xu Daorong 23 – 24, 153
 Zamenhof, L.L. 3, 137, 156
 Zborowska, B. 156
 Zurita, P. 182

Esperantaj Francaj Eldonoj:

Verkoj de L.L. Zamenhof

Fundamento de Esperanto, kun aldonoj kaj klarigoj. Bindita 13,20 gld., bruŝurita 10,80 gld., 355 paĝoj.

Lingvaj respondoj. 144p. Bind. 10,50; broŝ. 8,40 gld.

Marta de E. Orzeszko, trad. de L.L. Zamenhof. 213 paĝoj, ilustrita, bindita. 10,80 gld.

Hamleto de Ŝekspiro, traduko de L.L. Zamenhof. 206p. Ilustrita, bindita. 9,60 gld.

De la sama eldonejo: **Gvidlibro tra Paris**, de Julieta. 249 paĝoj, kun fotoj kaj urboplanoj; 8,70 gld. **La kunprinclando Andoro**, de Bacquer. 60 fotoj, 73p.; 6,00 gld. **Sen eliro; La respektema p...**, de Sartre, trad. Roger Bernard. 111p. 5,70 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

LA MONTARA KRONO

ĉefverko de la jugoslavia literaturo ankaŭ havebla ĉe la Libroservo de "Voĉo", Ŝkolska ulica 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio (Prezo: 60,00 dinaroj). Havebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA (15,90 gld.)

HUNGARA



VIVO

HUNGARA VIVO estas dumonata kultura revuo, aperanta ekde 1961 en Hungario. Ĉiu numero aperas sur 40 paĝoj, plus kovrilo, en la formato 28,5x20,5cm. Krom la prezento de la klasika kaj nuntempa hungara kulturo, ĝi dediĉas ampleksan spacon ankaŭ al la originala Esperanta literaturo. Sur ĝiaj paĝoj ofte aperas verkoj de Auld, De Kock, Goodheir, Miyamoto kaj aliaj elstaraj figuroj de la Esperanta literaturo.

Abonebla ĉe UEA kontraŭ 17,50 (por Nederlando 18,20) guldenoj.

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

◆ Esp/13

Kial Superdemokrata Sistemo? Ĉar ĉiuj ĝisnunaj formoj de la ekzistantaj registaroj originis el sovaĝa homnatura. Ankaŭ la nuntempe tiel multe distrumetata demokratio apartenas al la sama barbara ĝenro kontraŭracia. Tial ankaŭ ĝi, pro sia sovaĝa naturo, bojkotas ĉiun reduktion de libereco, eĉ se tio necesas por propra savo. Eĉ kiam tiu limigo estas diktata de la neŝanĝeblaj leĝoj de la naturo, eĉ kiam oni tiamaniere povus eviti la mempereon. Ne cedi al disciplinigo estas la flago tiel de diktatoroj kiel de demokrataj mensoj. Ili ambaŭ preferas memdetruon kaj ne pretas konsideri la rajton de la homo, kiu preferas vivi.


◆ Esp/14

Kio estas la Superdemokrataj Studcentroj? Ili estas lernejoj de universitata nivelo. Tie oni sin preparas, per memlernado, por gvidado politika en orkestra formo anstataŭ la ĝisnuna raba formo de Makjaveli. Tie, dum dudek jaroj, la estontaj politikaj gvidantoj sin preparas por gvidi kaj kunordigi malsovaĝigite. Tie la tempo estos foruzata duone en trakribroj de malnovaj ĵurnaloj, kaj duone en praktikado, por ĉe la lernantoj formi la nepre necesajn kapablajn spertojn, neniam akireblajn per vortoj. Ili pretiĝas por servi ne nur konsciencse sed ankaŭ kompetente,

dank' al kapabloj profesiaj, mankantaj al la politikaj klientoj en sufiĉa mezuro. Tute aparta regularo difinas la funkciadon de tiuj specialaj lernejoj.

◆ Esp/15

Konstatinte, ke ankaŭ tre eminentaj personoj en la sciencoj kaj artoj inklinas al anarkio, eĉ en matura aĝo, Superdemokratio konkludas, ke ĉiu ajn homo naskiĝas sovaĝulo, malpreta toleri la disciplinon, necesan por kunvivi inteligente en paco, kun minimuma malfeliĉo. Pro tio en Superdemokratio estas adoptita la formulo, ke, rilate la socion, ĉiu unuopa individuo estas unika laŭ sia profesia evoluinteco. Tial ĉiu unuopulo rajtas havi nur tiun dozon de libereco, kiun li/ŝi meritas pro la grado de la akirita disciplino. Tamen, tiu meritgrado estos rekonata pere de la juĝo de la etika elito, menciita en Esp/10.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18
I-40065 PIANORO, ITALIO



La trimonata revuo de TEJO plenas je interesaj artikoloj kaj riĉas je ilustraĵoj. Nun ankaŭ ĝia aperitmo ĝisdatiĝis. Ĝia juna redakta teamo havas junajn ideojn por 1980: lingva superrego per populara muziko, (mis)efiko de komputiloj je nia vivo. **KONTAKTO** iras aŭtomate al ĉiuj gejunuloj, kiuj membras en UEA/TEJO. Aliaj ĝin povas aboni (16,50 gld.) ĉe ĉiuj kotizperantoj aŭ rekte ĉe UEA. Rapidu por 1980, ĉar la revuo havas tian eldonkvanton, ke multaj antaŭaj numeroj jam plene elĉerpiĝis. Do, ne risku!

Ĉu vi valoras la libron?




Du mil homoj jam aĉetis la libron, ĉar. . . "Ĝis plibonigenda reeldono aŭ apero de Enciklopedio, ĝi estas la plej bona kaj plej informriĉa libro iam ajn verkita pri la Internacia Lingvo." M. Duc Goninaz

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

NOBELPREMIO 1974

Unu el la majstroverkoj de nia tempo



Nun en esperanto!

Serio Oriento-Okcidento de UEA

Tradukis William Auld kaj Bertil Nilsson

"Per Aniaro Harry Martinson, dank' al sia speciala talento – fantazio same altgrade de inĝeniero kaj poeto – fariĝis bardo antaŭ ĉiuj aliaj de la atomepoko." Karl Söderberg

Prezo: **58** sv kr
(En Svedujo 70 kun imposto)

Mendu tuj ĉe
ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Fack, 200 42 Malmö
Poŝtgiro 578-5
aŭ ĉe via libroservo